MAJO / JUNIO 1989

82

(100)

ISSN 0150-5823

La Laŭto!

Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista

Unu n-ro : 8 FF. Unujara abono kun adresaro : 40 FF.

Rekte ĝiri al pĉk-numero : 3371 74 M BORDEAUX, profite al :

Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut

PLURLINGVA EŬROPO

Lundon 23an de januaro, multmilionaj telespektantoj povis aŭdi de S-ro Delors, prezidanto de la Eŭropa Komunumo, ke la dekdunacia eŭropa komunumo havas naŭ oficialajn lingvojn. Kial naŭ ? Evidente tial, ke oni neglektis la gael-irlandan (ĉar la irlandanoj uzas ankaŭ la anglan lingvon), kaj tial ke la belgoj parolas aŭ nederlande aŭ france, kaj la luksemburganoj germane aŭ france. Do ni ne ĉikanu : nur naŭ.



S-ro Delors konfesis, ke tio estas iom ĝena. Sed "ni havas la plej bonajn tradukistojn en la mondo". Cetere li varme konsilas, ke ĉiu juna eŭropano fariĝu trilingva, lernante, krom sia gepatra lingvo, du fremdajn. Lerni du fremdajn lingvojn, estas eble. Paroli ilin flue, esprimi per ili ĉiujn nuancojn de la

penso kaj de la sentoj, kapti ĉiujn delikataĵojn, estas pli dubeble. Sed ni ankoraŭ ne ĉikanu : ĉiu eŭropano estu trilingva. Bone.

Nun imagu konversacion inter, ekzemple, greko, kiu bone parolas itale kaj germane ; dano, kiu bone parolas nederlande kaj angle ; portugalo, kiu bone parolas hispane kaj france. Kiel tiuj tri, posedante sume naŭ lingvojn, interkomprenos ?

Niaj oficialaj moŝtoj daŭre rondiras ĉirkaŭ la problemo, eĉ se ili ne neas ĝin, kaj neniu kapablas aŭ volas konsideri la solan praktikan solvon, tiun, kiun ni esperantistoj jam longe aplikas inter ni, ne nur sur la eŭropa, sed ja sur la tutplaneda areo.

Rezulte : kiom da bonvolaj gejunuloj vane plu dediĉos altvaloran tempon por lerni fremdajn lingvojn, kiujn la plimultaj el ili neniam kontentige regos ?

En la dekdunacia eŭropa parlamento estas jam pli ol 60 deputitoj favoraj al adopto de la lingvo internacia. Ĉi-jare okazos novaj balotoj por elekti reprezentantojn en tiu parlamento. Se ĉiu eŭropa esperantisto sin turnus al la kandidatoj en sia lando aŭ distrikto por klarigi al ili la demandon, eble ni povus iom antaŭenigi la solvon. La politikistoj ja ne estas tiel stultaj, ke ili ne komprenus niajn argumentojn. Cetere, "ne necesas esperi por entrepreni, nek sukcesi por persisti". Dume, ni fosu nian sulkon.

VALO

GEJ, JEFO kaj SAT-JF invitas al Internacia Junulara Renkontiĝo lige kun la 62a SAT-Kongreso, en Illertissen (Bavario) de 05 ĝis 12.08.1989.

La temo : **Eùropo post 1992 : ĉu nur por komercistoj ?**

El la enkonduko : La ĉi-jaraj elektoj por la Eùropa Parlamento montras vojon al nova epoko : La komuna merkato estos post 1992 la plej granda ekonomia unuo de la mondo. Ĝi unuigos 12 landojn kun 320 milionoj da enloĝantoj. El ekonomiaj vidpunkto, multo ŝanĝiĝos : La komercistoj havos pli vastajn eblecojn, libere interŝanĝi varojn kaj vendi siajn produktojn al tiom granda aĉetantaro. Samtempe, laborserĉantoj - precipe junaj - ne plu estos limigitaj al siaj hejmlandoj. La politikistoj pentras al ni allogan bildon pri grandioza, komuna estonteco.

Sed ĉu tia optimismo estas pravigebla ? Troa koncentriĝo en la ekonomio povas havi multajn negativajn konsekvencojn. La libera serĉado de laboro estas malhelpata de multaj faktoroj, ne laste de la lingvaj kaj kulturaj baroj...

(daùrigo p.65)

VERDA SOLIDARECO AL NIKARAGVO

Komence de 1986 mi profitis de maldungo kun monkompenso, kiu donis al mi tempon kaj monon por reiri dum tri monatoj al Nikaragvo, kie mi jam restadis saman daŭron en 1981.

Tiu dua restado ebligis al mi konstati la volon por daŭrigi la politikon pri sociaj, ekonomiaj, edukadoj kaj sanitaraj progresoj, direktatan de la sandinista registaro kaj de la popolaj organizoj, ekde la komenco de la Revolucio de 1979. Sed mi konstatis ankaŭ la malfortecon de la ekvilibro de tiu ĉi lando post kvar jaroj da ekonomia kaj militista (pere de la kontraŭ-revoluciuloj) atakado deklarita de la Reagan-a administracio. Do, la neceson de pli grava solidareco. Mi jam agis en franca organizo, poste mi havis ideon : krei neformalan internacian grupon kun esperantistoj, kiuj ŝatus helpi Nikaragvon.

La celo estas plenumi homaman projekton kiel esperantistoj. Tio preparos ankaŭ la estontecon de nia lingvo en la "tria mondo", kiam la urĝaĵoj estos solvitaj (malsato, sano, alfabetigo).

Tiam mi publikigis 4 paĝojn pri mia lasta vojaĝo kaj, fine de 1987, mi diskonigis skriban alvokon en pluraj E-revuoj por la financado de motorpumpilo por irigacii legom-ĝardenon (dum seka sezono) por plibonigi la nutradon de la kamparanoj de agrokultura kooperativo en regiono de Matagalpa. Tiun projekton proponis al mi kataluna agrikultura teknikisto, konata de mi en Nikaragvo, kaj fariĝinta responsulo en tiu ĉi kooperativo.

La ĉefa laboro en tiu kooperativo estas la kafo-kulturo. Komenciĝas du aliaj laboroj : bredado de ovonaskaj kokinoj kaj riverfiŝoj.

Dum la tuta jaro mi ricevis dudekon da respondoj kun mondonacoj el 10 landoj. Alfabetvice : Anglio, Belgio, Brazilio, Ĉeĥoslovakio, Danio, Francio, Hispanio, Italio, Svedio, Sovetio, plus la helpema propono de la junuloj esperantistaj de Managua. Sume estas 3000 frankoj (475 dolaroj), kiuj estis tute pagitaj al la kooperativo Jose Leono Diazo Kano en dec. 1988.

La elspezojn por la sendo de informoj al la kotizantoj (ses folietoj) krome italo kaj mi pagis. Ili konsistas proks. el 280 frankoj (44 dol.), do malpli ol unu dekono el la tuta monsumo investita en tiu agado.

Hodiaŭ ŝanĝiĝis la destino de tiu mono, ĉar motor-pumpilo estas pruntedonita de kanada organizo. La disdono de nia mondonaco estas jena :

- 50 dolaroj por aĉeti materialojn por konstrui domon
- 50 dolaroj por aĉeti motor-oleon por traktoro (vidu vi la rezultaton de la ekonomia blokado fare de Usono)
- 75 dolaroj por la infan-vartejo de la kooperativo
- 300 dolaroj por konstrui "konservejon" por la maizgreno por la kokinoj kaj la homa nutraĵo (pano el maizo).

Ni esperas baldaŭ ricevi foton de la konservejo signita de la verda stelo. Tiun agadon oni povas haltigi aŭ daŭrigi por plifirmigi la ligilojn kun la kamparanoj. Iam estos kiam la sonoj de nia lingvo bruos en la lernejeto. Mi atendas la respondojn de la nunaj kaj venontaj kotizantoj.

Se vi deziras la dokumentaron pri tiu ĉi agado (35 gramoj), sendu vian peton kun 2 internaciaj respondkuponoj (aŭ kolekteblaj poŝtmarkoj, por orienteŭropanoj) al :
J.L. HUSSE, Bourg Mazerolles,
F-40090 MONT DE MARSAN, Francio.

****

MAZDAĴETOJ

Mia neniofarado

Dolĉa siesto
en mia nesto
kun ĉarmulino
(tute sen vesto).

Laŭ vico

Unue Nl negliĝis,
poste Ml alsiniĝis
kaj iom alsuĉiĝis!

Vera aserto

Ŝi pravas,
ke ŝatas
oferti :
"Mi havas
nenion
por perdi!"

Mi

De enamiĝo
havas vertigon.

MICHEL DUC GONINAZ

la ŝtona gasto

miniatura tragedio
en 4 scenoj
laŭ PUSKIN

La unua prezentado de **LA ŜTONA GASTO** okazis la 27-an de novembro 1983 en la spektaklo-salonego de la Rozkruca Asocio AMORC (199 bis, rue Saint-Martin), en la kadro de la Unua Esperanto-Festivalo de PARIZO, organizita de Unuiĝo Franca por Esperanto.
Ĝin prezentis TESPA (Teatro Esperanta de Parizo) kun la jenaj rolantoj :

Donja Anna : Sylvaine BOURRELLY

Don Juan : Georgo LAGRANGE

Leporeto : Patrik' LAGRANGE

kun la partopreno de SAŜA en la rolo de la muta servistino.

Reĝisoris SOLEN'.

La kostumojn kaj dekoraciojn konceptojn SOLEN' kaj realigis la teknika fako de TESPA.

"Prezenti la miton de Don Juan en tiel kondensita formo povis unuavide aspekti kiel riska veto. Sed la akcepto de la publiko dum tiu festivalo, eĉ malgraŭ la mankoj de tro hasta preparado, pruvis, ke la ideo estis prava."

Georgo Lagrange

© Kopirajto ĉe la aŭtoro, 1984 (inkluzive de la prezentorajto). Dua eldono, 1989.
(Unua eldono, 1984, je 100 ekzempleroj, far H. Elik)

SCENO 1-a
Don Juan kaj Leporeto

DON JUAN. Madrido, urbo mia, ĝojo mia, jen mi denove staras inter viaj muroj. Madrido, urbo de mia juneco, denove mi tretas vian pavimon. Suno mia, saluton! Post longa ekzilo jen mi retrovas vin!

LEPORETO. Eble malprave, sinjoro.

DON JUAN. Kial malprave?

LEPORETO. Se valorus mia opinio, ni estus restintaj tie, kie ni estis, sinjoro.

DON JUAN. Kion mi timu? Ĉu la reĝo ne pardonis min kaj ne subskribis propramane la permeson, ke mi revenu en mian patrujon?

LEPORETO. La nova reĝo, jes, sinjoro, amnestiis multajn por festi sian kronadon kaj firmigi sian nefortikan tronon. Sed la aliaj vin ne pardonis.

DON JUAN. La aliaj? Kion ili povas kontraŭ reĝa ordono? La kaduka tirano mortaĉis, Leporeto, la vivo bolas en Madrido, la tuta urbo odoras liberecon...

LEPORETO. La reĝo reĝas, sinjoro, sed regas la malnovaj estroj, la ĉiamaj.

DON JUAN. Ĉu min timigus ministraĉoj, pastroj, policistoj aŭ kadukaj nobeletoj?

LEPORETO. Se vi estus simpla popolano, kiel mi, sinjoro, eĉ tiujn vi timus.

DON JUAN. Leporeto ĉiotima!

LEPORETO. Vi povas min moki, sinjoro, sed vi ne forgesu, ke via viktimo ne donacis al vi amnestion kaj sopiras al vengo!

DON JUAN. La Komandoro? De la tempo, kiam mi lin elpelis el la mondo de la vivantoj, li obstine mutadis kaj li mutados plu ĝis la mondofino. Kaj mi zorgas pri li, kiel pri neĝo pasintjara.

LEPORETO. Ĉu vi ne timas liajn familianojn?

DON JUAN. Aperu unu el ili ĉi tie kaj videbligos, ĉu don Juan estas el la regimento de la timuloj.

LEPORETO. Ĝi estu laŭ via volo, sinjoro. Sed mi bedaŭras la fremdalandan vivon.

DON JUAN. Ha, Parizo, Londono, tio plaĉis al vi!

LEPORETO. Hamburgo, Kopenhago...

DON JUAN. Pu! Fride kaj triste. Preskaŭ mi mortis pro enuo.

LEPORETO. La tempon tamen vi pasigis gaje.

DON JUAN. Kiel eble plej. Ĉion novan oni ŝatas. Sed mi satiĝis de ilia griza ĉielo kaj palaj virinoj.

LEPORETO. Satiĝis, jen ĝusta vorto.

DON JUAN. Satiĝis kaj naŭziĝis. Ĉiujn nordajn blondulinojn mi fordonus por ajna andaluzia kamparanino. Ne fuŝu mian ĝojon, Leporeto. Madrido, urbo de miaj amoj, saluton. Saluton, Hispanujo mia! Vin retrovinte, ekbatas, eksaltas mia koro.

LEPORETO. El via brusto ĝi ne saltu for!

DON JUAN. Kio?

LEPORETO. Via koro, sinjoro. Vi certe bezonos ĝin ankaŭ ĉi tie.

DON JUAN. Precipe ĉi tie. Mi sentas jam, ke belas la virinoj.

LEPORETO. Pa! Ili ne ĉesis beli, eĉ dum via foresto.

DON JUAN. Dubinde. Ili belas pro mia rigardo.

LEPORETO (al si mem). Kia senlima orgojlo!

DON JUAN. Kion vi diras?

LEPORETO. Ha, sinjoro, mi pri la virinoj... nu, sinjoro, la virinoj vin pereigos.

DON JUAN. Originalus tio. La famo suf ĉe distrumpetis, ke ilin pereigas mi. Cetere, vi eble pravas. Ili tiel malfidelas, ke ĉia perfido eblas.

LEPORETO. Malfidelas? Perfido? Tion diras vi, sinjoro?

DON JUAN. Tion diras mi. Neniun el ili mi forgesis. Ekamante novan, mi la aliajn konservas en la koro.

LEPORETO. Via koro estas vasta.

DON JUAN. Kaj la memoro bona.

LEPORETO. Ha jes, sinjoro, ĉu vi memoras pri Elvira?

DON JUAN. Kiel ne memori? Lipoj fajnaj kaj kvazaŭ sinkaŝemaj, okuloj grandaj kaj naivaj. Kortuŝa estis ŝi... ŝi longe rezistis, sed poste ne volis min lasi...

LEPORETO. Kaj Izabela, kun okuloj senhontaj kaj eĉ pli senhonta konduto...

DON JUAN. ... kun etaj cicoj, streta talio kaj malmola pugo. Kvazaŭ knabo. Ĝuinda!

LEPORETO. Kaj Maria, Inès, Klementin', via kara Klementin', hihi (li ridas).

DON JUAN. Ĉiujn mi memoras plu. Sed kiam virino ĉesas ami, ĝi estas kvazaŭ la viro, kun kiu ŝi hieraŭ pasie amoris, estus hodiaŭ neniam ekzistinta. Kaj al la nova amato ŝi povas kun la plej perversa sincereco deklari: "Vi estas la unua. Ĝis via apero mi neniun

amis, neniun konis. Mia vivo komenciĝas kun vi. Kio estis antaŭe, tion mi forgesis." Kotopo, kotopo. Kiel bubaĉo-lernejano forŝiras de kajero misajn paĝojn. Kaj kompense, ŝi sentas sin rajtigita nin regali per scenoj de ĵaluzo, pretekste, ke ĵaluzo kun amo ĝemelas.

LEPORETO. Ĝuste pro tio ili ĵaluzas, sinjoro.

DON JUAN. Pro kio?

LEPORETO. Ke la aliajn vi memoras.

DON JUAN. Ha jes, virina logiko.

LEPORETO. Malgraŭ tio, vi elserĉos novajn amatinojn kaj aldonos novajn viktimojn al la jam longa listo.

DON JUAN. Longa listo, jes, se plaĉas al vi paroli kiel provinca notario. Sed viktimoj? Jen vorto inda je triaranga policisto, mia kara Leporeto. Aŭ je tragediisto de l'pasinta jarcento.

LEPORETO. Ha, certe, ke vi jam elcerbumis planon. Al kiu ni iros nun?

DON JUAN. Al Laŭra. Tuj. Senprokraste. Laŭra, mia fidela kunulino!

LEPORETO. Fidela, via aktorino? Mi vetus, ke depost via foriro el nia kara Madrido, ŝi gastigis en sia listo dekojn da viroj.

DON JUAN. Kaj da virinoj, certe. Ĝuste tial mi nomas ŝin fidela, ĉar mi scias, ke ŝi min akceptos kun rido, kantoj kaj amorpreta korpo, sed ne tedos min per riproĉoj kaj memorigo pri la larmotorentoj, kiuj ŝprucis el ŝiaj belaj okuloj dum mia foresto.

LEPORETO. Aktorino certe kapablas lerte komedii kaj adapti siajn grimacojn al viaj deziroj.

DON JUAN. Kiu kapablas arte aktori, tiu ne estas trompulo, sed kreanto de vivo. Male, la virtulinoj, tiuj diletantaj fuŝaktorinoj, regalas nin per histeriaj scenoj indaj je trigroŝa melodramo...

(Apenaŭ videble paŝas en la scenofundo nigre vestita juna virino. Don Juan ŝin ekvidas. Ne nepras, ke ŝin vidu la publiko.)

... Leporeto!

LEPORETO. Sinjoro?

DON JUAN. Kiu estas tiu ĉi virino?

LEPORETO. De kie mi tion scius, sinjoro?

DON JUAN. Vi tion eksciu tuj. Kia figuro! Silueto gracia, ĉarmoplena. Paŝado dama. Parfumo amorveka. En la okuloj kia fajro!

LEPORETO. Sed, sinjoro, ŝia vizaĝo tute ne estis videbla, kaj mi apenaŭ rimarkis piedeton, verdire belforman...

DON JUAN. La ceteron mi imagas. Kiel gravas, komenci ĉu de la brovoj, ĉu de la piedoj. Leporeto!

LEPORETO. Sinjoro?

DON JUAN. Sekvu ŝin, informiĝu, kiu ŝi estas, kaj kie ŝi estas renkontebla.

LEPORETO (*al si mem*). Renkontebla? Li volas diri : fikebla.

DON JUAN. Kio?

LEPORETO. Sinjoro, hm, mi volis diri... Vi do rezignas pri Laŭra?

DON JUAN. Male, mi al ŝi kuras tuj. Sed por tio mi ne bezonas vin.

LEPORETO. Sinjoro...

DON JUAN. Nu?

LEPORETO. Vi ludas per la fajro.

DON JUAN. Ĉu vi obeos, finfine, kaj ĉesigos viajn komentojn stultajn?

SCENO 2-a
Don Juan kaj Donja Anna

Voĉo de lakeo. Don Diego de Kavaldo.

DONJA ANNA. Enkonduku lin.

(*Don Juan envenas kaj salutas*)

DONJA ANNA. Estu bonvena, don Diego. Laŭ mia vivregulo mi akceptas neniun viron en mian domon. Vi krome estas al mi nekonata. Sed mi faris por vi tiun escepton...

DON JUAN. Bonvolu kredi, sinjorino, ke mi alte aprezas tiun favoron, kiu donas al mi la okazon...

DONJA ANNA. ...ĉar vi estas la sendito de estimataj parencoj miaj.

DON JUAN. Via nobla kuzo don Pedro komisiis min transdoni al vi lian saluton kaj respektan senton.

DONJA ANNA. Mia nobla kuzo iĝis tre ceremonieca dum lia restado en Parizo. Li ĝis nun ne ofte zorgis pri sendo de salutoj.

DON JUAN. Li esprimis ne nur la noblajn sentojn, kiujn meritas via altestimata persono, sed ankaŭ la varman fervoron de frata amo.

DONJA ANNA. Ĉu li krome fariĝis sentimentala? Ververe, li ŝanĝiĝis sub fremda ĉielo. Diru, don Diego, vi certe estis inter liaj intimaj konatoj?...

DON JUAN. Mi ne aŭdacus tion diri. En Parizo mi restadis mallonge. La vivo de ekzilito estas ofte malstabila.

DONJA ANNA. Ha, ankaŭ vi ekziliĝis pro malkonsento kun niaj tiamaj registoj? Kruelas politiko. Homoj malamikas, familioj disiĝas, viroj interbuĉiĝas... Do, kun don Pedro vi almenaŭ samideanis.

DON JUAN. Hm, jes, certe, sendube. Min trafis ja la sama sorto pro la kaprico de senkompata regnestro.

DONJA ANNA. Kiel fartas lia estiminda edzino donja Amelja?

DON JUAN. Ŝi fartas bone, dank'al Dio.

DONJA ANNA. Ŝi do trovis taŭgajn kuracistojn en Parizo?

DON JUAN. Hm, certe, jes, sendube. La progresoj de l' medicino en nia epoko...

DONJA ANNA. Ĉu? Eĉ tio estas kuracebla? Ha, en Parizo, kompreneble... Nu, don Diego, ĉu mia kuzo ne konfidis al vi leteron?

DON JUAN. Ne, sinjorino. Li tion opiniis tro danĝera. Sed li postulis de mi la promeson, ke mi nepre vin vizitu tuj ĉe mia alveno Madridon.

DONJA ANNA. Estu dankata, don Diego, pro via afableco. Tiu komisio kaŭzis al vi zorgojn.

DON JUAN. Mi dankas la Ĉielon, sinjorino, ke tiu komisio donis al mi la neesperitan privilegion ĝui vian ĉeeston.

DONJA ANNA. Vi povas elturniĝi sen mondumaj komplimentoj. Mi de ili senkutimiĝis.

DON JUAN. Mondumajn komplimentojn mi ne elparolas, sinjorino. Mia buŝo esprimas nur tion, kion diktas la koro.

DONJA ANNA. Viaj vortoj, don Diego, estas strangaj.

DON JUAN. Aŭdacaj eble, strangaj ne.

DONJA ANNA. Mi... kiel diri... eble miskomprenis.

DON JUAN. Perfekte vi komprenis. Mian sekreton mi

elbabilis impertinente. Vi nun certe forpelos min kiel skabian hundon.

DONJA ANNA. Forpeli vin? Kial? Pri kiu sekreto vi parolas?

DON JUAN. Ĉu pardoneblas mia hontinda artifiko?

DONJA ANNA. Ĉu vi frenezas?

DON JUAN. Frenezas mi certe, sed pro amo nur. Jes, vi ĉion komprenis, tion mi legas en viaj okuloj. Vi komprenis, ke min pelas senespera, sed brulanta pasio, kiun kaŭzis via beleco, via nerezistebla ĉarmo...

DONJA ANNA. Sed...

DON JUAN. Vi komprenis, ke vivi unu plian tagon mi ne povus, se min ne lulus la espero almenaŭ ekvidi vin, almenaŭ ĝui vian rigardon kaj la mildon de via voĉo.

DONJA ANNA. Sed kiam vi ekamis min? Vi ja ĵus alvenis Madridon.

DON JUAN. Kiam? Ĉu gravas tio? Hieraŭ, ĉi-matene, antaŭ tri minutoj... Mi scias nur tion, ke, ekvidinte vin, mi ekkomprenis, kio estas feliĉo. Se mi ne enamiĝus tiel arde, ĉu mi hazardludus mian honoron en tian etaniman ruzaĵon?

DONJA ANNA. Ruzaĵo... artifiko...? Ĉu...?

DON JUAN. Jes. Vi ĉion komprenis. Via kuzo estis nur preteksto. Cetere mi neniam vidis lin. Kaj mi ne konas lin, nek lian estimindan malsanan edzinon, diablo ilin prenu! Kaj vi mem pri ili ne interesiĝas!

DONJA ANNA. Kiel vi aŭdacis? Tiel senhonte...

DON JUAN. Sinjorino...

DONJA ANNA. Ĉu tiel kondutas hispana nobelo? Sub falsa preteksto elpostuli rendevuon por babili amindumaĵojn, kiajn mi delonge ne plu aŭskultas?

DON JUAN. Delonge? De kiam?

DONJA ANNA. For de la mondo mi vivas depost la morto de l'edzo.

DON JUAN. De don Gonzale d'Ulloa, la Komandoro, tragike pereinta.

DONJA ANNA. Hontinde, senhonore murdita de viro fia.

DON JUAN. De tiu... La nomon mi forgesis...

DONJA ANNA. De don Juan Tenorjo, iu diboĉulo kaj fimurdisto, kiun la registaro tro milde punis per ekzilo.

DON JUAN. Sed jaroj pasis for. La decan devon vi plenumis jam.

DONJA ANNA. Ne temas pri deco.

DON JUAN. Pri kio do? Ĉu la Komandoron vi tiom amis?

DONJA ANNA. Kiel edzon devas ami nobla damo.

DON JUAN. Devas? Ho, donja Anna, ĉu vere amo vin gvidis al la nupto?

DONJA ANNA. La edzon elektis mia patro. Don Gonzale estis riĉa. La moroj nun ŝanĝiĝas. Sed li estis por mi la sola viro, la amanta kunulo de miaj junecaj jaroj. Min, knabinon, li ŝanĝis al virino.

DON JUAN. Lin vi ne amis!

DONJA ANNA. Kiel vi povas tiel impertinente tion aserti? Kiu donis al vi la rajton min pridemandi, sendiskrete rezonadi pri miaj familiaj aferoj, treti plej sanktajn miajn sentojn?

DON JUAN. Kiel bela vi estas, donja Anna, pasioplena en ĉi tiu kolereksplodo! Kiel fiera, kiel aminda! Sed la edzon vi ne amis... Tamen feliĉa estis li! Li per sia mono kaj prestiĝo aĉetis trezoron, por kiu mi, malbenito, fordonus mian vivon.

DONJA ANNA. Don Diego! Ĉi tiajn vortojn mi ne volas aŭdi. Vi devas nun ĝentile retiriĝi.

DON JUAN. Ne sen promeso de nova rendevuo!

DONJA ANNA. Don Diego! Mi ne povas, mi ne rajtas.

DON JUAN. Kio vin malhelpas? La klaĉoj de viaj lakeoj? Ĉu vi ne estas damo nobela, libere disponanta pri si mem? Kiu rajtas al vi ion ajn malpermesi? Forpasis la malnova tempo, la kadukaj moroj elĉerpiĝis, donja Anna. Kiu nun en Madrido riproĉos vin, ke vi amas laŭ via emo kaj plaĉo? Ĉu vi intencas foroferi vian belecon kaj voluptodezirojn al stultaj superstiĉoj kaj entombigi vin vivanta en ĉi tiun nigran veston?

DONJA ANNA. Vi misuzas mian malforton, don Diego, foriru nun, vi jam tro longe restadis ĉe mi.

DON JUAN. Do, kiam ni renkontiĝos?

DONJA ANNA. Mi ne scias... Morgaŭ.

DON JUAN. Ĝi signifas : post jarcento. Hodiaŭ.

DONJA ANNA. Hodiaŭ, sed...

DON JUAN. Ĉi-vespere. Kie?

DONJA ANNA. Eliri el ĉi tie por mi maloportunas.

DON JUAN. Ĝis vespero, donja Anna. Mi frapos vian pordon kun la korbatado de juna abituriento.

DONJA ANNA. Ĝis vespero, don Diego, iru nun.

DON JUAN. Ne sen promeso de feliĉo. (*Li proksimiĝas al ŝi, kaptas ŝin ĉe la ŝultroj, ŝi malforte lin repuŝetas*). Unu kison nur!

DONJA ANNA. Ha, malpacienca vi. Jen. Rapidu nur. (*Ili interkisiĝas*). Iru nun, don Diego.

SCENO 3-a
Don Juan kaj Leporeto

DON JUAN. Mi ĝojas, Leporeto, mia belulino kuŝos ĉi-vespere inter miaj brakoj.

LEPORETO. Sinjoro, oni en la urbo parolas pri timinda afero.

DON JUAN. Vi ĉiam ĝenas min per misaŭguraj klaĉoj, Leporeto. Nu, pri kio temas?

LEPORETO. Oni rakontas en la urbo, ke don Karlos malaperis, eble estis murdita.

DON JUAN. Tiu sentaŭgulo! Li dormas nun poreterne kaj ne plu spitos nin.

LEPORETO. Sinjoro, mi timas kompreni...

DON JUAN. Tre simpla afero, Leporeto. Tiu malsaĝulo troviĝis ĉi-nokte ĉe Laŭra. Mi alvenis neatendite. Unu el ni estis troa.

LEPORETO. Ĉu vi volas diri, ke vi lin...

DON JUAN. ...silentigis porĉiame, jes. Requiescat in pace. Cetere la duelo estis plene laŭregula.

LEPORETO. Aĥ, sinjoro! Ĉu vi ne asertis hieraŭ, ke vi ne ĵaluzas?

DON JUAN. Mi ne, sed li jes. Mi bedaŭras, ke li rifuzis mian amikecon. Lin trafis tio, kion li meritis.

LEPORETO. Sed Laŭra...?

DON JUAN. Ŝi ne tro paŭtis pro la okazintaĵo. Male eĉ. Mi liberigis ŝin de tedulo, kiu arogis, ke ŝi min forpelu. Ŝi eĉ tre ĝuis tiun belan sceneton kaj ties konkludon. Artista animo! Cetere, ŝi ĝis la mateno prikantis en miaj kantoj laŭdojn al la forpasinto. Li estis laŭdire lerta amoranto. Meritoplena ulo, ĉu ne? Bedaŭrinde, unu detaleto pereigis lin. Kion fari kontraŭ sia destino?

LEPORETO. Aĥ, sinjoro, nin trafos denove tedaĵoj.

DON JUAN. Ĉiama timulo! Nenia danĝero! La lakeoj de Laŭra zorgis je frumateno pri malaperigo de l' kadavro. Ĉio estas en ordo. Krome, ŝi ĝuas protekton ĉe la Kortego. Nenio ĝena povas okazi. Sed ni parolu pri aferoj pli agrablaj. Leporeto, viaj zorgoj ne estis vanaj. Donja Anna estos mia ĉi-vespere.

LEPORETO. Vi jam flegas tiun esperon, sinjoro?

DON JUAN. Ne nura espero. La rendevuo estas jam aranĝita.

LEPORETO. Ne, Leporeto, ŝi kun la aliaj ne samas. Ŝi estas vera anĝelo, kiun al mi sendis la ĉielo.

LEPORETO. Ha, sinjoro, vi pri ĉiu ajn virino parolis same.

DON JUAN. Ŝi ne estas iu ajn.

LEPORETO. Ho, sinjoro, ĉu hazarde vi estus serioze enamiĝinta? Ĉu donja Anna estus la lasta amatino de Don Juan?

DON JUAN. Kiu povas tion diri? Ĉiu virino povas esti la lasta. La morto gvatas nin ĉe ĉiu stratangulo.

LEPORETO. Nekredeble, kia pesimisto vi iĝis, sinjoro. Ankoraŭ hieraŭ, nur pri la vivo vi pensis, ne pri la morto.

DON JUAN. Sufiĉe da babilaĵoj, malmolkapa lakeo! Preparu ĉion por la hodiaŭa vespero. Mi estas feliĉa, Leporeto, mi volus kanton improvizi, mi pretas la tutan mondon brakumi...

LEPORETO. Sinjoro, tiu ĉi aventuro estas plej timinda.

DON JUAN. Kial?

LEPORETO. Donja Anna estas ja la vidvino de...

DON JUAN. ...de don Gonzale, la Komandoro, sendube. Sed por ŝi mi estas la senkulpa don Diego, ĝisorele enamiĝinta.

LEPORETO (*flustre, al si mem*). Fia trompo!

DON JUAN. Kion vi diras?

LEPORETO. Nenion, sinjoro. Danĝeran ludon vi entreprenis.

DON JUAN. Ŝi jam pardonis al mi unu mensogeton. Tiel kondutas amanta virino. Min ŝi ekamis je la unua ekvido. Donja Anna, anĝelo mia!

LEPORETO. En la transmondo, sinjoro, rolas ne nur anĝeloj, sen venĝosoifaj fantomoj. Ĉiufoje, kiam mi vidas tiun statuon (*li montras al statuo ne nepre videbla de la publiko*)...

DON JUAN. Ha, prave la tiama registaro starigis sur tiu ĉi majesta placo de nia amata urbo tiun monumenton al sia fidela apoganto. Ekvidante ĝin, mi humile demetu la ĉapelon kaj murmuru preĝon. Kia nobla figuro! Kiel altkreska! Li dumvive estis etanima kaj malkuraĝa duonkadukulo! Ja lia familio trudis al li la duelon kun mi. Tiuj bigotoj ne toleris, ke de lia fratino mi forrabis la monaĥinan virgecon. Kiel li domaĝis la vivon, kiun mi tamen forprenis de li! Sed la marmoro vestis la mortinton per digno, fiero kaj braveco. En sia nova stato, li iĝus plej estiminda gasto. Se li ĉeestus la ĉi-vesperan festenon, mi sentus min tre honorita.

LEPORETO. Sinjoro, kial ŝerci pri tiaj aferoj?

DON JUAN. Mi ne ŝercas, Leporeto, iru al la statuo kaj transdonu mian inviton al Lia Moŝto Komandora.

LEPORETO. Sinjoro...

DON JUAN. Nu, iru. Ĉu vi ne aŭdis mian ordonon?

LEPORETO. Mi ĝin ne komprenis. Inviti statuon? Ĉu al vespermanĝo?

DON JUAN. Al vespermanĝo kaj cetero. Iru.

LEPORETO. Mi ne povas, sinjoro.

DON JUAN. Ne povas? Ĉu subite kripliĝis via nelacigebla lango?

LEPORETO. Mi timas...

DON JUAN. Ha ha! (*minace*). Iru senprokraste. (*Leporeto hezitas*) Tuj obeu!

LEPORETO. Sinjoro, aĥ, ne decas tio. Dio nin punos (*Don Juan gestas minace*). Ha, kion mi diru? Neniam mi alparolos statuon.

DON JUAN. Diru al la nobla Komandoro, ke mi, don Juan Tenorjo, invitas lin ĉi-vespere ĉe lia vidvino, donja Anna, por festeni kun ni, por spekti kaj kunĝui niajn amorludojn.

LEPORETO (*timeme proksimiĝas al la statuo*). Nobla Komandoro, mia mastro don Juan petas, ke mi diru al Via Moŝto, ke li ĉi-vespere kun via edzino... tio estas vidvino... ke li invitas vin... ke vi spektu... aĥ, sinjoro...

DON JUAN. Sentaŭgulo! Vi retorikas kiel kongresa oratoro. (*Tre laŭte*). Komandoro don Gonzale d'Ulloa, mi, don Juan, invitas vin por ĉeesti ĉi-vespere la rendevuon, kiun konsentis al mi en via domo via nobla kaj ĉasta edzino donja Anna. Ĉu vi venos?

LEPORETO (*terurite*). Hu, sinjoro!

DON JUAN. Kio?

LEPORETO. La statuo...

DON JUAN. Nu?...

LEPORETO. Ĝi jesis per la kapo!

DON JUAN. Stultulo! (*li paŝas antaŭen*). Nu, Komandoro, ĉu mian inviton vi akceptas? (*li paliĝas. Mallaŭte*) Ha, mil diabloj!

SCENO 4-a

Don Juan kaj Donja Anna (ruĝe vestita)

DON JUAN (*li ĵus eniris, iras al donja Anna, prenas ŝiajn manojn kaj kisas ilin*). Sinjorino, pro emocio ŝvelas mia koro. Esprimi mian ĝojon superas mian forton.

DONJA ANNA. Tre ceremonieca vi estas, Diego. Vi ĉi-matene estis pli aŭdaca.

DON JUAN. Sinjorino... Donja Anna, vin vidante, mi sentas tremon.

DONJA ANNA. Ĉu mi estas tiel timinda? Aŭ ĉu la nuntempaj hispanaj sinjoroj tremadas en ĉeesto de virino?

DON JUAN. Ha, donja Anna, vin ektuŝi ŝajnas al mi peke. Tian feliĉon mi ne meritas.

DONJA ANNA. Ne meritas? Kiu postulis, ke vi ion meritu? Vi estas ĉi tie pro mia deziro, ĉu tio ne sufiĉas? Ĉu tiaj estas viaj nunaj moroj? Tiaj la nunaj viroj? Vi predikas liberecon, proklamas senbridiĝon de l' volupto, kaj jen vi staras antaŭ la amata virino kiel kavaliro en sia kiraso. Aŭ kiel kulpa knabeto. Ej, viroj, strangaj vi estas! Vi delogas virinon kaj ŝi devas vin instigi por paŝi pluen. (*ŝi tenere brakumas lin ĉe la kolo*).

DON JUAN. Prave vi diris, donja Anna, ke mi estas kulpa.

DONJA ANNA. Kulpa? Pri kio? Jen strangaj vortoj. Don Diego, diru al mi la veron. Ĉu vi havas edzinon? Amatinon, al kiu vi ligiĝis? Ĉu ami min kontraŭas al via honorsento? Ha, tiaj skrupuloj atestas pri via kornobleco.

DON JUAN. Pri tio ne temas. Mi estas viro libera.

DONJA ANNA. Nu, kio do? Kiel vi povus kulpi? Ĉu kontraŭ mi? Ridinda supozo. Nu, klarigu vian diron.

DON JUAN. Neeble. Ĝi estas terura sekreto.

DONJA ANNA. Terura sekreto? Rakontu, Diego, mi estas ege scivola!

DON JUAN. Vi pro ĝi min malamos.

DONJA ANNA. Vin malami? Kiel eblus? Nur unu homon mi malamas en Madrido kaj en la tuta mondo.

DON JUAN. Kiun do?

DONJA ANNA. La senhonoran eksterleĝulon, kiu kaŭzis la plej grandan malfeliĉon en mia vivo, la malnoblan murdinton de mia edzo...

DON JUAN. Ĉu vi lin tiel senkompate malamas? Ĉu vi neniam ekpensis, ke pri la pereo de don Gonzale iom kulpis ankaŭ la pereinto mem? Ĉu vin neniam tuŝis la ideo, ke la eksterleĝulo, kiun vi senapelacie kondamnas, ke tiu don Juan...

DONJA ANNA. Lian nomon mi ne volas aŭdi! Kial vi pelis min al tiu temo? Kial vi lin defendas? Diru, Diego, vi ne havas iun ligon kun li, ĉu?

DON JUAN (*al si mem*). Jen decida momento! (*Laŭte*) Donja Anna, kion vi farus, se vi hazarde renkontiĝus kun don Juan?

DONJA ANNA. Kiel ĵurite, mi lin mortigus senprokraste.

DON JUAN. Propramane?

DONJA ANNA. Propramane.

DON JUAN. (*li prenas armilon kaj ĝin proponas al donja Anna*). Jen mia brusto, donja Anna, forpafu min el

ĉi malaminda vivo.

DONJA ANNA. Kion vi faras, Diego? Vi parolas sensencaĵon, mia amiko. Kion signifas ĉi tiu malsprita komedio?

DON JUAN. Mi ne estas Diego, mi estas Juan.

DONJA ANNA. Neeble, neeble, vi freneziĝis!

DON JUAN. Mi estas don Juan. Mi mortigis cian edzon, tiun malestimindan kanajlon, kaj pri tio mi ne pentas. Mi estas don Juan kaj mi cin amas.

DONJA ANNA. Aĥ, don Diego, ĉu eble? Ĉu...

DON JUAN. Ne Diego! Juan mi estas.

DONJA ANNA. Don Juan! Kiel povas ebli? La famo vin pentris tiel abomeninda!

DON JUAN. Eble tia mi estis ĝis min trafis via rigardo. Vin ekaminte, mi sopiras al amo konstanta kaj feliĉo kvieta. La malnova Juan estas for!

DONJA ANNA. Tiajn senhontajn banalaĵojn vi recitis al cent, al mil virinoj, kiujn vi fie delogis kaj senhonorigis.

DON JUAN. Al kiuj mi donis ĝuindajn momentojn, kaj kiuj tion ne bedaŭras, krom la stultaj. Sed kompari ilin kun vi estus peko. Unuafoje en mia vivo mi spertas senton samtempe tiel ardan kaj tiel kvietigan.

DONJA ANNA. Jes, elokventas don Juan. Belaj vortoj, ja plej dangera armilo lia.

DON JUAN. Uzu do ĉi armilon, pli certe mortigan ol ĉiuj miaj vortoj. La morton mi ne timas. Nu, kial ci hezitas? Mi estas ja la murdinto de l' nobla Komandoro!

DONJA ANNA. (*ŝi ĵetas la armilon kaj impetas al lia brusto*). Ha, kiel mi malfortas! Mi tuta vin sopiras. Mi al vi min fordonas, Juan.

DON JUAN. Jes, Juan estas mi, kaj ci estos mia.

(li ekkaresas ŝian kolon kaj bruston. Ŝi milde repuŝas lin)

DONJA ANNA. Ne, mi mem faros (*ŝi abrupte forŝiras la robon, nudigante la antaŭan parton de sia korpo, kiun ŝi prezentas al li. Li staras senmova kelkajn sekundojn kaj etendas manon al ŝi. Aŭdiĝas frapo. Ambaŭ senmoviĝas*). Kio bruis? (*Nova frapo*) Dio mia, kio okazas? Aj, premiĝas mia koro.
(*Don Juan sin turnas, tiel ke ambaŭ rigardas al la pordo, de kie aŭdiĝis la frapoj*)

Voĉo. Don Juan, mi venis laŭ via invito.

DONJA ANNA. Ha, Juan! Kio ĝi estas? Ha, terure!

La voĉo. Don Juan, ni vin juĝis kaj kondamnis. Vi devas sekvi min. Ĉu vi estas preta?

DON JUAN. Ĉu tiel frue?

La voĉo. Vin tremigas timo, don Juan.

DON JUAN. Min? Ne. Mi vin invitis. Estu vi bonvena.

La voĉo. Donu vian manon.

DON JUAN. (*li rigidiĝas, lia mano pugniĝas, kvazaŭ kaptita de nevidebla forto*). Ha, malvarmo kaptas mian korpon. Stona malvarmo.

La voĉo. Venu.

DONJA ANNA. (*terurita*). Kion vi diras? Juan, kio estas? Ha, kiel pala vi fariĝis!

DON JUAN. Ankoraŭ momenton, sekundon nur! Apenaŭ la lumon mi ekvidis...

La voĉo. Ne. Prokraston vi ne rajtas.

DON JUAN (*metas la liberan manon al la koro, sufokiĝas kaj svenas malrapide sur la plankon, kriante*). Ellasu min... Mi mortas... Ha, Anna, Anna!

La lumo estingiĝas

LISTO DE SAT-BROŜURSERVO

Mendkodo. Titoloj (Aŭtoroj)	Prezo en FF
Aa. La antaŭvenantoj de Anarkiismo (Armand)	4
AA. La Aperoj de Ahasvero (Han Riner)	20
AL. Alvokoj al la homa konscienco (APJR)	6
AN. Nia angorplena socio (Milan Ŝimeĉka)	3
AO. Anarkio kaj organizo (Malatesta)	4
AP. Amo per proverboj (Azevedo)	1,50
AR. Argentina Novelaro (18 noveloj)	20
BA. Bazoj de Anarkiismo (Balkanski)	20
BP. Legendo pri la bela Pekopeno (V.Hugo)	15
BU. La racia kaj ateista budhismo	4
ĈI. Ekologio : ĉu ideologio ? (W. Gunther)	3
ĈS. Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti)	6
DI. Kiel diri...? (Lentaigne), E-frazeologio	25
DU. Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Parîo)	3
EA. Esperanto in 24 pages (angla)	1
EH. Esperanto en 24 páginas (hispana)	3
EI. Esperanto su 24 pagine (itala)	3
EL. Elekto de tekstoj de Bakunin	10
ES. Por ekologia socio (Murray Bookchin)	12
ET. Etiko I (Kropotkin)	12
EV. Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti)	4
FA. Konstrui fajron (Jack London) novelo	4
FE. Esprimaro Franca-Esperanta (Bourgois)	45
FI. Laŭ la fluo de l'interparolo (Bourgois) Esp./Fr.	8
FZ. Filozofio Zoologia (Lamark)	20
GE. Abrégé de grammaire esp-o (Lentaigne)	7
GR. Grammaire & Esperanto (Lentaigne)	5
HP. Humanitaristaj Principoj (Eugen Relgis)	3
IE. Initiation à l'Esperanto (An Kaù)	5
IM. Individuista Manlibreto (Han Riner)	4
IN. Individualisma socialismo de A.R.Protschowsky	2
KB. Kie brulas, ĝentlemanoj? (poemaro) Buchowski	18
JA. Jaro 2000 (H. Muller) disdona ekonomio	30
KD. La Krimoj de Dio (Sébastien Faure)	4
KE. La Kvina Evangelio (Han Riner)	15
KF. Kontraŭflue (Valo)	10
KI. El la kara infaneco... (Valo)	12
KP. Katastrofplano pri Fessenheim + Wyhl	5
LK. La Konflikto (Le Dantek) + Dubi (Alain) tr. Lanti	20

LL. Leteroj de Lanti (ĝis 1937)	45
LM. La Mondo ne havas atendejon (Dekker)	15
LN. Linguistique et non-violence (Masson)	2
LR. La Ribelo (Joseph Roth) romano	18
ME. La Mistero de nia surtera vivo (Archdeacon)	4
MN. Ĉu militista defendo estas kredebla? (Lasserre)	6
MS. Memvola Servuto (La Boétie)	4
MV. Mia vivo. Artikolaro. Poemaro (Bartelmes)	10
NE. Naciismo kaj Esperantismo (S.Aarse)	8
NC. Naciismo (Lanti)	12
NI. Nia Individuismo (E. Armand)	4
NL. Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo (Leo Polak)	3
NO. Nova Paradigmo en Psikologio (Feldman)	35
PA. Pensoj de PASKALO (ekstraktoj)	15
PF. Proverbaro Franca/Esperanta + Esprimoj sankciitaj de l'uzado (Bourgois)	12
PL. Esperanto kaj Literaturo (R.Laval)	3
PN. Politika Neperforto (M.A.N.)	8
PR. La Poemo de Rodano (Frederi Mistral)	30
PS. Psikotransformismo (Ergoto de Bonaero)	4
PT. Piramido de l' Tiranismo (Domela Nieuwenhuis)	3
RA. Revolucia registaro. Pariza Komuno (Kropotkin)	6
RO. Rompoj (A.Jacquard)	4
SJ. Sepdek jaroj sub la verda stelo (Valo)	12
SN. Sveda Novelaro	30
SR. Les 16 règles commentées (R.Laval)	3
SS. Sindikatismo. Sovetoj (A.Pannekoek)	4
ŜG. La Ŝtona Gasto (Michel Duc Goninaz) (teatraĵo)	5
TD. Tiel diru! (Lentaigne) supl. de DI por francoj	25
TP. La Turo de l' Popoloj (Han Riner) romano	20
US. Unueco super prokreda dividiĝo (Leo Polak)	3
VH. Ĉu ni vere helpas la trian mondon? (Roberts)	10
VI. Veraj Interparoladoj de Sokrato (Han Riner)	20
VL2. Verkoj de Lanti 2. (3 semajnojn en Rusio Tro Plena Gramatiko, Diskutejo, Epiloge)	20
VL3. Verkoj de Lanti 3. (Artikoloj, paroladoj kaj ekstraktoj el leteroj de 1937 ĝis 1946)	20
VO. Vortoj de Kamarado E. Lanti	20
VT. El verkoj de Leo Tolstoj (Patriotismo kaj registaro, Al politikistoj, Ĥodinka, Ne mortigu!)	7
ZH. La Zamenhofa Homaranismo (A. Caubel)	4

VORTOJ DE MALJUNULO

valo

Poluadoj*

Fine, la ŝtatinstancoj de la industriaj regnoj okupiĝas pri tiuj gasoj de aerosoloj, kiuj difektas la ozontavolon de la alta atmosfero, per kiu ni estas ŝirmataj kontraŭ la kancerigaj ultraviolaj radioj. Fine oni malpermesos la fabrikadon kaj vendadon de tiuj nocaj aerosoloj, jam longe denuncitaj de la ekologiistoj. Bone !

*Sed dume oni ignoras aŭ neglektas alian faktoron de multe pli grava danĝero, nome la termikan poluadon. Se oni daŭrigos la pli kaj pli intensan uzadon de fosiliaj brulaĵoj (karbo, petrolo kaj ĝiaj subproduktoj : mazuto, keroseno, benzino, gasoleo, natura gaso), oni pli kaj pli ŝarĝos la aeron per dioksido de karbono (CO^2) kaj aliaj gasoj, kiuj produktas "efikon de forcejo", kaj samtempe niaj industrioj konsumantaj energion disverŝados en la atmosferon varmokvantojn, kiuj plialtigas ĝian temperaturon. 2°C pliaj sufiĉas por endanĝerigi la rizplantaĵojn, la tritikon, la maizon, ĉiujn cerealojn necesajn por la nutrado de pli kaj pli multaj homoj. Kiom da pliaj gradoj necesos por fandi la glacian tavolon de la Antarktika kontinento ? Oni ne scias precize, sed kiam okazos tiu fando - eble jam en la XXI-a jarcento -, tiam okazos plej granda ekologia katastrofo : la oceannivelo plialtiĝos je ĉirkaŭ 80 metroj, kaj submergos unue la vastajn deltojn kun multopa loĝantaro (Bengladeŝo, Nildelto), poste la plej industriajn regionojn de la mondo kaj urbegojn kiel Nov-Jorko, Londono, Parizo, Kairo, Ĝenovo, Marsejlo, Rio, Buenos-Ajreso, ktp.***

* Mi preferas "poluado", uzita de Neergaard, al "polucio" (PIV,2), kies signifo tro diferencas de "polucio" (PIV,1).

La solvo ? Anstataŭigi ĉiujn ĝis nun utiligitajn energifontojn, inkluzive la nuklean, per la sola sunenergio. Ne per la ĝis nun provitaj gaĝetoj, kies fiasko misfamigis tiun energion, sed per vera industria produktado serioze pristudita en la Alĝera universitato, per procedoj patentitaj en 1981-1982. Kaj anstataŭigi ĉiujn fosiliajn brulaĵojn (kiuj cetere iam elĉerpiĝos) per hidrogeno, kiu estas facile produktebla per elektrolizo kaj transportebla per gasoduktoj, kaj ne pli danĝera ol iu alia gaso, se nur oni uzas facilajn antaŭzorgojn.

*Ĉio ĉi estas farebla, se oni survojigos la teknikan precizigadon de la patentitaj procedoj, kaj konstruos en Saharo la industriajn instalaĵojn, en fruktodona kooperado inter la Eŭropa Komunumo kaj la Magrebaj landoj. Estas ankoraŭ ne tro malfrue, sed estas tamen urĝe. Kiel pri la defendo de ozono, necesas, ke la publika opinio mobiliziĝu, kaj pezu de sia tuta maso sur la politikaj responsuloj. ***

60 jarojn retroe

En la 20aj jaroj, S-ro Léon Bérard, franca ministro pri nacia edukado, malpermesis al la lernejestroj pruntedoni klasĉambrojn por kursoj pri esperanto. La franca esperantistaro malbenis tiun reakcian ministron, kiu rigardis nin kiel danĝerajn revoluciulojn.

Feliĉe, de tiam la mensoj ŝanĝiĝis. En la jaroj 70aj, kiam ili konsistigis grandan plimulton el la opozicio, la socialistaj kaj maldekstraj-radikalaj parlamentanoj prezentis sinsekve du leĝproponojn por enkonduki la instruadon de esp-o

---

** Libroj pri tiu temo, de Doktor-Inĝeniero Maurice Touchais :

- en franca lingvo : L'Energétique solaire, pli speciale destinita al scienculoj kaj teknikistoj. 1986.
- en franca kaj angla versio :
  Cancer et écologie. Une vision du futur
  Cancer and ecology. A vision of the future. 1988

Tiu ĉi sin turnas vulgarige al plej vasta publiko. Esperanta versio prespreta ĉe SAT-Broŝurservo.

en la publikajn lernejojn. Sub tiuj leĝproponoj, ne unu subskribo mankis.

Do, kiam en 1981 la maldekstra opozicio fariĝis absolua plimulto, kaj venis maldekstra registaro, granda espero ekfloris en la franca esperantistaro. Kvin jaroj pasis, dum kiuj tiu progresema registaro kompreneble havis pli urĝajn taskojn por prizorgi. En 1986 revenis dekstra registaro, kaj ne temis plu pri la famaj leĝproponoj.

En 1988, nova alterno, la maldekstro retrovas plimulton. Sub prezidento Mitterrand ekregas ĉefministro Rocard kaj edukministro Jospin : tri el la multaj subskribintoj de la du leĝproponoj. Do, ĉi-foje, finfine...

... Kaj kio okazas ? Tiuj sinjoroj aŭtoritate ĉesigas la esperanto-kursojn en lernejoj, kie tiuj ĉi jam (neoficiale) funkciis. Kvazaŭ la socialista Jospin estus inda posteulo de la reakcia Bérard. Kaj oni bombaste proklamas, ke la francaj infanoj devas lerni fremdajn nacilingvojn, unuavice, kompreneble, la anglan-usonan. Verŝajne tial, ke Francio bezonas favoron de S-ino Thatcher kaj de S-ro Bush. Tio estas realpolitiko.

Kiam do ni esperantistoj ĉesos fidi al la diverskoloraj politikaj ĉarlatanoj ?

Malnova foto

Inter paĝoj de libro, kiun mi malofte foliumas, estas enŝovita fotoportreto datita de 1925. Tiam la reprezentata persono estis 25-jara, kiel mi. Ŝi mortis kelkajn jarojn poste.

Mi rigardas tiun belan vizaĝon de antilia mulatino. Tiujn grandajn nigrajn okulojn, kies fajro estas estingita. Tiujn pulpajn lipojn, volupte kisemajn, kies ĉarma rideto lasis lokon al rikano de dentoj en eburblanka kranio. Sed tiuj funebraj imagoj ne anstataŭas por miaj okuloj la freŝan vizion de viva juna virino.

Mi dormas, mi songas. En vasta halo brile prilumata, bonega orkestro ludas kanton pri feliĉa amo. Subite eksplodegas tondro. La lumoj estingiĝas, la muziko ĉesas, ĉio ekdronas en nigra nokto kaj morta silento.

Baldaŭ poste, de malproksime duonaŭdiĝas la ĥoro de la Naŭa Simfonio. Komence tre mallaŭte, la sono iom post iom pliintensiĝas, kaj fine plensonoras la himno al ĝojo. En mia memoro revenas la moto de Betoveno : tra sufero (al) ĝojo.

Mi vekiĝas en sento de profunda paco.

Por mi maljunulo la tempo de amoro estas pasinta. Sed ne velkis la amaj sentoj.

Kial mi konservas tiun senvaloran paperpecon, sur kiu estas fiksita sendaŭra momento de antaŭ sesdek jaroj ? Ĉu fetiĉismo ?

Kiel diris Paskalo : la koro havas motivojn, kiujn ne konas la racio...

Dudu foriras

plendokanto de forlasita Antilia knabino, plej fama "bel-air" (bela ario = popolkanto) el Martiniko.

el la Antilia kreoldialekto esperantigis **Valo.**

La ŝipo jen sur la rodo jen
kunportos ĝi dudu mian for.
Dudu de mi foriras nun,
iras, ho ve! por ĉiam for!) bis

Adje fulard', adje madras',
adje orgrajna kolĉen', adje!
Sen dudu neniam plu plezur',
jen for dudu, adje, adje!) bis

- dudu : karesa vorto por amato. La junaj Antiliaj patrinoj uzas ĝin ankaŭ por sia bebo, kiel en lulkanto kantita de Jozefino Baker.
- adje! = adiaŭ! franca adieu, kreole adiéps. adje'
- madraso : kvadrata ŝtofpeco el bunta teksaĵo fabrikita en Hindio, per kiu la Antilianinoj faras al si specon de simpla turbano, kiu plaĉe sidas al ili.
- orgrajnoj : krudformaj orpecetoj, per kiuj oni formas kolĉenojn.

TRAVIVI KUN TRISOMIA INFANO

Mi havas propran sperton pri mongolismo, aŭ sindromo de Down (daŭn) aŭ ankaŭ trisomio 21.

Mia sepjara pranevino naskiĝis kun tiu sindromo.

Se la vorto "mongolismo" estas komuna en la francling vaj landoj, en la anglo-usonaj la plej konata estas sindromo de Down (nomo de unu el la kuracistoj, kiuj priskribis tiun malsanon, meze de la deknaŭa jarcento), tamen la plej taŭga nomo ŝajnas esti "trisomio 21", kiu plej bone montras la kaŭzon de tiu genetika anomalio.

Naskiĝo

Unue, mi rakontos la dramon de la naskiĝo de Julie. Poste, mi provos klarigi kio estas trisomio 21. Fine, mi diros kiel vivas Julie kaj ŝia familio en la vilaĝo.

Mia nevo Bernard edzinigis Marie Carmen en 1972. Post unu jaro, sen problemo, naskiĝis bela knabo : Olivier. Poste Marie Carmen spontane abortis. En 1981 al la paro (33-jara) denove anonciĝis bebo por la unuaj tagoj de Marto 1982. Tamen subite ĝi naskiĝis la 14an de Februaro: estas filino! Por la tuta familio granda estis la ĝojo. Malfeliĉe la ĝojo ne daŭros.

Rapide oni forprenas la ĵus naskitan bebon de la patrino kaj transportas ŝin al la specialigita sekcio por frunaskitoj en la hospitalo, por reanimi ŝin. Plie oni malprecize parolas pri eta problemo : gastrito. Regas mistera etoso. Tamen la patrino ne ankoraŭ maltrankviliĝas.

Kun mia kunulo mi vizitas ĉiutage la bebon. Malantaŭ vitro ni observas ŝin kuŝanta, tute nuda, en vitra bebkovilo. Ni rimarkas ŝvelajn okulojn, dikan kaj molan kolon. La flegistinoj evidente evitis nin. Kreskas mia maltrankvileco. En la ĉambro de la patrino mi legas sur la protokolo pri la naskiĝo : "kranio malbone ostigita". La kuracisto diras al la patro, ke kelkaj refleksoj ne bone funkcias.

Julie maldikiĝas, oni nutras ŝin per tubo. Marie Carmen deziras fotojn de sia filino. Ni faras, sed neniam montras ilin al ŝi. Iom post iom kreskas nia turmentiĝo, sed neniu

el la kuracistaro kuraĝas anonci la veron. Al Marie Carmen la kuracisto parolas ankaŭ pri iu timiga signo en la mano de la bebo. Post 10 tagoj, antaŭ ol reveni hejmen, la patrino deziras kisi sian filineton. Ŝi kaj ŝia edzo surmetas blankajn kitelojn por eniri la kovĉambron. La patrino ame karesas tiun etuleton. Ŝajnas, ke la patro, renkontinte la kuraciston, do pli informita ol la patrino, ne konsentas intime patriĝi.

Certeco

Finfine, 12 tagojn post la naskiĝo de Julie, la estro de la frunaskitejo klare anoncas, ke ekzistas vera anomalio. Oni atendas kariotipan esploron, kiu postulas tri aŭ kvar semajnojn.

La juna patrino ekkrias : "Ĉu eblas, ke ŝi estas mongolismulino?..." kaj tuj memkulpiĝante : "de kiu, de kio, tio povas veni? - Ni devas atendi"... estas la respondo de la kuracisto.

Jako kaj mi telefoninte al kuracistaj amikoj kaj al laboratoriistino, serĉante en libroj, finfine malkovras la teruran veron. Ni aĉetas en Parizo diversajn librojn kaj dokumentojn, kiuj samtempe premegas kaj kuraĝigas nin.

Do post 13 tagoj, ni certiĝas, laŭ nia studo, ke Julie estas mongolismulino. Kiel tiun teruran novaĵon la gepatroj, la frato, la geavoj, la tuta familio akceptos?

Imagu nian nokton. Certe mi persone ĉagreniĝas sed mi koleras nepre kontraŭ la sinteno de la kuracistoj. La morgaŭan matenon de tiu rivelo, mi ne rezistas je la bezono renkonti la kuraciston, kiun mi devigas akcepti min en sia oficejo. Mi abrupte alparolas lin : "Julie estas mongolismulino, ĉu?".

" - Ha, li ekkrias, tiun vorton mi ne volas aŭdi. Julie estas trisomiulino!" " - Jes! ĉu tio ne samas?" - "Tiel estas!..." - "Tion vi sciis, kiam ŝi naskiĝis... kiam vi reanimis ŝin. Kial lasi vivi nenormalan bebon?"

Denove li ekkrias : "Mi ne permesas, ke vi tiel parolu... vi vidos : Tiuj infanoj estas ĉarmaj, ĝojaj, amemaj! Ekzistas specialaj lernejoj por ili... Viŝu viajn larmojn kaj pretu helpi la gepatrojn."

Mi eliras pli afliktita, pli ribelema. Mi ne plu kuraĝas viziti Julie dum kelkaj tagoj, mi eĉ esperas, ke iu grava malsano forprenos ŝin. Unu monaton post la naskiĝo, kromosoma anomalio estas certigita kaj Julie plu vivas en la kovejo. La tuta familio jam amas ŝin malgraŭ ŝia ne kutima aspekto.

Ses tagojn pli malfrue, ankaŭ grava anomalio estas detektita, ĝi estas la kialo de la haŭta blueco kaj de la pena spirado de la bebo.

Hejme

Finfine, post unu monato kaj duono, Julie, solene, eniras en la farmodomon de la gepatroj. La tuta familio festas la knabineton kaj unuiĝas por helpi ŝin kaj ŝiajn gepatrojn. La avino, forgesante siajn malhelpojn, ne plu bezonas marŝbastonon por ofte viziti la bebon en la najbaran domon. La naŭjara frato observas la malplenigadon de la suĉboteloj. Li promeŝas ludilon kiam Julie pezos 90 gramojn pli. La gepatroj mirinde adaptiĝas. Kiel fari alie ? Je la familiaj okuloj, ŝi fariĝas bela knabineto.

- Tiamaniere Julie eniras nian vivon ! Feliĉe, la familio loĝas en eta vilaĝo, kies vilaĝanoj montriĝas komprenemaj, kaj paŝon post paŝo ili adoptis Julie.

Kio estas tiu kromosoma anomalio ?

Ni supraĵe analizu la kialojn. Ĝi estas la plej ofta el la genetikaj akcidentoj (po inter unu kaj du el mil en Francio).

Ekde 1959 oni scias, ke tiu genetika anomalio enkondukas ĉiujn perturbojn en la tuta korpo, movo, parolkapablo, animsento, fizikaj kaj intelektaj kapabloj. Kontraŭ la ofte asertata diraĵo, trisomio estas ete aŭ ege perturbata, ni povas certigi, ke oni naskiĝas trisomiulo aŭ ne. Malsamecoj inter la trisomiuloj estas kompareblaj al tiuj, kiujn oni observas inter ĉiuj homoj konsiderataj "normalaj homoj".

Mi ne estas biologiisto, mi nur provos klarigi la esprimon "trisomio 21". Ĉiu homa ĉelo entenas 23 duojn da kromosomoj. Kiam en laboratorio biologiisto konstruas kariotipojn, li trovas 47 kromosomojn anstataŭ 46. Li observas, ke la 21a paro entenas 3 kromosomojn, dum la unua duoniĝado de la ĉelo, duobliĝis unu kromosomo de la 21a paro. Oni ankoraŭ ne tre bone konas la kaŭzon de tiu eraro.

Antaŭ kelkaj jaroj, la maljuneco de la virino ŝajnis la ĉefa kaŭzo. Nun oni scias, ke ne, kvankam maljuna virino pligrandigas la ŝancon naski trisomiulon kaj tiu ŝanco ne estas nula por juna virino.

Oni ne povas, nuntempe, eviti tiun anomalion. Oni nur povas frue evidentigi ĝin dum la gravediĝo per ekzameno de la amnia likvaĵo, kion bedaŭrinde oni tro malofte faras : tio estas riska kaj multekosta !

Oni tiam ne faris al Marie Carmen, kvankam ŝi antaŭe spontane abortis, kaj kvankam oni sciis, ke genetika anomalio estas la kaŭzo de kvarono el la spontanaj abortoj. Kiam la kariotipo evidentigas anomalion, la gepatroj povas elekti : aŭ ĉesigi la gravedecon aŭ prepari sin al speciala edukado de la naskiĝonto.

Sepjara trisomiulino : mia Julie

Fruedukado

La plej grava regulo : ju pli frue oni komencas la adaptitan edukadon, des pli la trisomiuloj povos ampleksigi siajn latentajn kapablecojn.

Renkontante Julie, vi tuj vidos, ke ŝi estas trisomia laŭ la vizaĝo, laŭ la korpo, laŭ la agmaniero. Ekde la naskiĝo, du fojojn semajne la patrino akompanas ŝin por speciala kuracado celanta fortigi la muskolaron. Julie marŝis sola ekde la dua jaro. Nun sepjara, ŝi altas kiel trijara knabineto. Ŝia malbona korstrukturo necesigis du enhospitaligojn. Ŝi konstante bezonas medikamentojn kaj ĉiujare ŝi devas iri por korekzameno en specialigitan hospitalon. Nuntempe ne eblas operacii. La vivprognozo de Julie estas limigita je ĉ. la deka jaro. Ni ne detale parolos pri ĉiuj etaj malsanoj, kiuj, ĉe Julie, ĉiam pli graviĝas, ĉar, kiel al ĉiuj trisomiuloj, mankas imuna kapableco.

Dank'al sensaj ekzercoj Julie akiris manan lertecon. Aliflanke ŝi partoprenas la vilaĝan dancgrupon, kie ŝi lernas ekvilibron kaj disciplinon. Oni eĉ rimarkis, ke ŝi estas la nura knabino, kiu purigas siajn plandumojn sur skraptapiŝo.

Oni scias, ke la intelekta kvociento de tiuj infanoj atingas apenaŭ 60. Tamen dank'al senĉesa pacienco kaj multaj ampruvoj, ili kapablas bone observi, bone ripeti gestojn. Ekzemple : Julie balaas, brosas siajn dentojn, ordigas siajn vestaĵojn, aranĝas la manĝilaron sur la tablon, sed ŝi subite ĵetas ĉion teren aŭ elversas vian varman teon.

Ŝiaj reagoj ne estas konjekteblaj! Pro tio, la edukado

estas malfacila, vere elĉerpiga por rezulto bedaŭrinde malgranda kaj senmezura kun la esperoj.

Hejme, ŝi kapablas komuniki per gestoj, per paroloj en sia propra lingvo komprenata nur de la familianoj. Frue la patrino akompanis ŝin ĉe ortofonisto (paroledukistino), kiu instruas al ŝi diversajn "ludojn", kiujn, ĉiutage, la patrino ripetigas. Julie kapablas asocii bildon kun rememoro : ekzemple sciuro memorigas al ŝi la ruldometon en naturista kampadejo, kie ŝi libertempas.

Lernejo

Je la tria, Julie eniris la infanĝardenon de la vilaĝo. Ŝi estis tre bone akceptata de la instruistinoj kaj de la geknaboj sen problemoj, eĉ de la gepatroj de la gelernantoj. Tie ŝi ne ricevas specialan instruadon, sed ŝi lernas vivi kun aliaj infanoj sen familia helpo. Je la fino de la jaro, ŝi partoprenis la jarfinan feston de la lernejo. Ŝi dancas same kiel la aliaj, eĉ pli bone! ĉar ŝi kapablas helpi malatenteman kunulinon. Dank'al la gesta metodo de la ortofonisto, je la sepa jaro Julie kapablas rekoni la sonojn : a, e, é, i, u, f, ŝ. Ŝi kapablas skribi nur : i, o. Jam venas la tempo, kiam la gepatroj ne plu povas lasi Julie en la vilaĝa lernejo, ĉar ŝi bezonas veran adaptitan instruadon. Nova suferdona paŝo por la gepatroj estas tiu agnosko pri la nenormaleco de ilia filino. La patrino scias, ke tiun paŝon ŝi devas fari, sed ŝi hezitas forsendi sian filinon en specialan lernejon, kie ŝi renkontos nur geknabojn kun samaj aŭ pli gravaj perturboj. Rilate al la emocia sinteno, kiel ĉiuj trisomiuloj, ŝi estas tre amema kaj deziras tenerecon. Ŝi tre ŝatas aplaŭdon kaj montras sian ĝojon, kiam ŝi sukcesas novan etan progresaĵon.

Estonteco. Ĉu pravis la akuŝisto ?

Tia ŝi estas kaj tia ŝi estas la suno de la geavoj. Mi malkvietiĝas pri la estonteco.

Ĉu Julie plu vivos? Se jes, kiel kaj kiom longe? Kiu zorgos pri ŝi? Ĉar zorgojn ŝi ja konstante postulos. Se ŝi ne vivos, kia kruela korŝiro por la tuta familio! Kaj tamen, fine, restas la demandoj : Ĉu la akuŝisto pravis revivigi Julie? Ĉu frua ekzameno estus ŝanĝinta ion?

Respondu, kiu povas.

GBEGLO Koffi :

La eterna vivo, ĉu rekompenco por la di-kredantoj ?

La kristanoj dividas la mondon en du partojn : la parton de la kredantoj kaj tiun de la ne-kredantoj. Ankaŭ la islamanoj tion faras. Nu, kiuj estas la kredantoj ?

La Biblio klarigas, ke neniu povas vidi Dion, se li ne akceptas Kriston. La kredantoj, laŭ la kristanismo, estas la akceptantoj de Jesuo Kristo. La aliaj homoj estas la ne-kredantoj kaj ili ne povas iam ĝui la eternan vivon. La Korano instruas, ke Mahometo estas la profeto de la tuta mondo; kiu lin ne rekonas, tiu estas ne-kredanto kaj la eterna vivo estas ne lia. Kiuj do povas ĝui tiun eternan vivon?

Laŭ la Biblio, la Islamanoj estas ne-kredantoj, kaj laŭ la Korano, la Kristanoj estas miskredantoj. Ŝajnas, ke kredantoj tute ne ekzistas. Tamen, ĉiuj kristanoj diras, ke ili timas pri la aliaj homoj, ĉar ili ne ĝuos la eternan vivon, pro sia ne-kredemo. Kion pri tiu eterna vivo, pro kiu nian mondon oni iel dispartigas?

Iuj diras, ke post la morto la animo forflugas el la korpo kaj tiam devas esti juĝita. Se la mortinto malpekis dum sia surtera vivo, lia animo ĝuos la eternan vivon kune kun Dio; kontraŭe, la animo estos ĵetita en gehenan fajron. Aliaj diros estas, ke, dum la morto, la forpasinto konscias nenion; li restadas en tiu dormo ĝis la reveno de Kristo, kiu relevos ĉiujn por la lasta juĝo. Tiam la bonfarintoj ĝuos la eternan vivon kune kun Kristo, dum la aliaj estos fordonitaj al eterna morto. Ĉu tiu postmorta morto aŭ tiu postmorta vivo estas realaj? Kiel oni devas konduti por indi la vivon eternan? Kompreneble, oni estu Di-kredanto.

Ĉu pro la eterna vivo oni devas adori Dion? Kia tiu vivo estas? Oni rakontas, ke suferoj neniaj tie kaj tiam ekzistos, ĉiuj estos feliĉaj, disponante pri ĉiaj luksaĵoj, ĉiuj estos liberaj fari kion ajn li volos, malsanoj kaj malsatoj kaj ĉiaj malagrablaĵoj ne ekzistos. Ĉu ne rimarkindas, ke la esperantoj de la eterna vivo estas tre alkroĉitaj al surteraĵoj? Se tiu eterna vivo reale ekzistas, ĉu tia ĝi devas esti? Kiu iam ĝuos tion por raporti pri tio? Ĉu pro tiu eterna vivo oni devas kredi je Dio? Ne decas, ke oni kredas je Dio, pro tio ke oni ricevu poste rekompencon. Ĉiu devas bonvoleme kaj tutlibere kredi je sia Dio. Se la eterna vivo ne estas promesita, ĉu iu sin konsideras Di-kredanto?

Jam tempo estas, kiam ĉiu devas malfermi siajn internajn okulojn. Ni iru for de fanatikismo. Dio ekzistas aŭ ne, tion ne bezonas ni scii antaŭ ol adori nian Dion. Se eĉ Dio ekzistas, Li ne estas tiel postulema kaj severa kiel la Biblio kaj la Korano kaj aliaj kredolibroj tion mencias; liaj indulgemo kaj helpemo igas, ke li ne bezonas nian troan adorkliniĝon. Lia deziro estas, ke ĉiu rekonu la homecon de siaj samhomoj. Gravas, ke ni komprenu, ke Dio estas en ni, tiu fonto de senfina AMO. Ni forgesu, eĉ ne kredu tiun eternan vivon kaj klopodu koni nin mem kaj la aliajn. Agu ni juste kaj tuja feliĉo invados nin, ni sentos nin senĝenaj kaj nenia vivproblemo trafos nin. Ni sciu, ke ni estas la kaŭzo de nia malfeliĉo, aŭ de nia feliĉo.

Edgard JAMART :

Feliĉoj kaj malfeliĉoj de l'kristanismo

*(laŭ kaj el la verko "**Mil jaroj de kristana filozofio**" de Evaldo PAULI)*

1.

Unue necesas substreki ke, sen la judaismo, la kristanismo ne ekzistus. Tiu ĉi religio, kiu aperis antaŭ dudek jarcentoj, ricevis sian elirbazon el la judaj sektoj.

La kristanoj memoru, ke ili ŝuldas sian religion al la dio de l'Judoj kaj de ties filoj.

Eble ili ne plu scias, aŭ neniam sciis, la gravan rolon de la greka civilizacio en la disvolviĝo de sia religio, kaj la similecon inter kristanaj ritoj, sakramentoj aŭ misteroj, kaj tiuj de la paganoj ?

Se ne estus supernatura karaktero, oni povus konsideri kristanismon nur kiel kulturan fenomenon de religia evoluado.

Se oni aprobas la historian karakteron, oni scias, ke Jesuo el Nazareto promenadis predikante en Palestino; li havis multajn kontaktojn kun sektoj de la regiono, precipe kun la esenoj.

Estis sadukeoj ĝenerale la sacerdotoj kaj ĉefe riĉuloj de Jerusalemo. Ili havas akcepteman spiriton koncerne la helenan kaj roman kulturon. Ili kredas nur laŭ la Torao, tio estas laŭ la libroj ĝis Moseo. Ili ne akceptas la profetojn nek la postajn doktrinojn; ili akceptas nur la dian antaŭ-elekton de juda popolo, kaj ke Dio helpos tiun popolon.

Farizeoj, zelotoj kaj esenoj akceptas la librojn de la profetoj kaj esperas, ke Dio sendos savonton de la juda popolo. Kiel Jesuo, ili estas kontraŭ la sadukeojn, do kontraŭ la sacerdotojn kaj la riĉulojn.

La naciaj konvinkoj de tiuj tri sektoj naskiĝos post la detruo de Jerusalemo en 587 antaŭ nia erao, kiam la profetoj svingas super ĉiuj kreduloj la esperon pri iu estonta Savanto sendota de Dio. La zelotoj estas pli militemaj, dum la farizeoj estas pli doktrinemaj kaj predikas ankaŭ al aliaj nacioj por konverto de ĉiuj al la juda religio; tiel faros poste ankaŭ la kristanoj.

Se estonte la farizeoj kaj kristanoj tre kontraŭbatalas unuj la aliajn, tiu ĉi cirkonstanco rezultos el la fakto, ke la farizeoj daŭrigas sian gravecon post la detruo de Jerusalemo en la jaro 70, dum la aliaj sektoj praktike malaperos. La militoj kontraŭ la romanoj finiĝos kun la detruo de Jerusalemo.

Eble Barabaso estis unu el tiuj zelotoj, kaj pro tio konsiderata de la romanoj kiel krimulo kaj de la popolo kiel patrioto. Kompreneble, kiam la roma prokuratoro Pilato prezentis al la judoj Barabason kaj Jesuon, ili interpretis Barabason kiel arestitan heroan judon kaj defendanton de iliaj naciaj interesoj kontraŭ la oftajn maljustaĵojn de la romanoj.

La esenoj estas la plej similaj al la primitiva kristanismo. Sen ili, eble ne ekzistus kristanismo, ĉar ĝi estas fondo de esenoj kaj komence ĝi estis kiel la esenismo mem,

kvankam kun kelkaj nuancoj de io nova, kaj kapabla evolui en novajn direktojn.

Tiu movado naskiĝis ĉirkaŭ 150 a.K. La nomo Eseno devenas de la siria lingvo kaj signifas "sanktigita". Ordinare, la esenoj vivis ekster la urboj, en komunumoj de fraŭlaj homoj kaj helpo de "sanktaj" virinoj. Johano la Baptisto estis tipa eseno; li predikis la esenan mesaĝon pri la venonta mesio ĉe la bordo de rivero Jordano. Simileco inter Johano kaj Jesuo estas miriga.

Multaj el la kristanaj ritoj, kiel sakramentoj de bapto kaj komuna sankta manĝo, jam antaŭ-ekzistas ĉe la esenoj. Ili kredas pri la reviviĝo de la mortintoj, pri la fino de la mondo kaj pri la juĝo de ĉiuj koncerne la bonajn kaj malbonajn verkojn.

Fraŭleco estis alia karaktero propra al Kristo kaj al liaj disĉiploj.

Antaŭe, la puriga bapto jam estis rito de la pitagoranoj, orfeistoj kaj religianoj de Mitra. Sed la kristanoj ricevas la bapton pere de la esenoj.

Rimarkinda estis la opono kontraŭ la klerikaron kaj ĉiajn riĉaĵojn. Multaj kristanoj pripensu tiun ĉi vidpunkton!

Jesuo estis certe bona homo kaj inteligenta, precipe saĝa, kvankam ne erudiciulo. Eble li sciis nur legi kiel la simplaj homoj, kaj ne parolis la grekan lingvon kiel la tiutempaj judaj kleruloj. Li ne verkis skribe. La kunmeto de liaj religiaj konoj, kun la novaj disvolvoj, kiam li estis en ekstazaj momentoj, rezultigis iom post iom tabelon de doktrinoj pli elstaraj ol tiuj de aliaj esenaj grupoj. La nov-esena grupo de Jesuo akiris pli altan inspiron, kaj la afero falis en manojn de homoj, kiuj kapablis verki en la helena ties mesaĝon.

Ĉu Jesuo vere havis revelaciojn? Tion ni povas diskuti aparte; unue per la ekzameno pri la fideleco de la informoj skribitaj pri li nur post multaj jaroj; due per la demando, ĉu tiu fenomeno havas aliajn psikologian kaj parapsikologian interpretojn. Ni ne forgesu, ke tiutempe oni sciis nenion pri subkonsciaj fenomenoj.

La dua juda fazo de la naskiĝanta kristanismo okazis kaŭze de la morto de Jesuo. Al tiu morto almetiĝis ankaŭ la signifaj faktoj pri la supozo, ke li reviviĝis kaj pri la supozo, ke la pentekosta fenomeno de la lingvoj

havis supernaturan signifon.

Evidente, la morto de Jesuo kaŭzis embarason al tiuj, kiuj kredis pri lia mesieco. Ĉu li povus esti mesio, se li mortis? La konfuzo fariĝis granda, li mortis en la manoj de la malamikoj : de la judoj kaj de la romanoj, kiuj krucumis lin, nuda antaŭ ĉiuj, inter du ŝtelistoj, eble zelotaj aktivistoj. Aliflanke, tamen, se tiuj disĉiploj estis esenoj kredantaj je la reviviĝo, kaj se ili estis fanatikuloj, kaj konsiderante, ke ili akceptis la eblecon de la revelacio kaj de la vizioj, povis okazi, ke iu el ili efektive havis vizion pri la morta mesio denove vivanta, kaj ke kompreneble ĉiuj la aliaj kredis pri la reviviĝo. Jen hipotezo ekzameninda. La informoj estis skribitaj multajn jardekojn poste, kaj ekzistas nur raportoj de la kristanoj mem.

Unu el la kuriozaj informoj kiam mortis Jesuo estas pri la reviviĝo de aliaj mortintoj de la tombejo de Jerusalemo, kun la almetita aserto, ke multaj vidis ilin. Kio okazis kun tiuj aliaj reviviĝintoj? Do, la ebleco pri nur viziaj reviviĝintoj estas serioza ekzameninda hipotezo, ĉiam kiam la afero rilatas asertojn faritajn de atestantoj el esenaj aŭ kristanaj naskiĝintaj formoj de kongregacio.

La kristanoj fariĝas kreskeme distingaj de la aliaj esenaj grupoj, ĉar ili havas nun faktojn novajn, kiuj kunigas ilin specife. Aliflanke, la rita komuna manĝo, kiun ili praktikas kiel esenoj, iĝas pli kaj pli signifa, ĉar ĝi estas la motivo de la komuna vivado kaj samtempe la ĉefa momento por praktiki la religion ekde la momento, kiam la aliaj judoj kreas malfacilaĵojn al ili en la templo de Jerusalemo.

Dum la lasta komuna manĝo kun Jesuo mem, la rakonto metas en la buŝon de Jesuo tiun interpreton : "Faru tion en mia memoro!" Do iu esena kutimo fariĝis la plej signifa religia kulto de la kristanoj ekde la tempo mem de la morto de Kristo, kaj aspektas kiel unu el la relative novaj faktoj de tiu dua juda fazo de la naskiĝanta kristanismo.

2.

Tuj almetiĝas la helena influo sur la kristanismon. Tio devus necese okazi, ĉar la helena kulturo estis tre signifa

kaj pli erudicia. Heleniĝintaj judoj vivante ekstere kaj revenante al Jerusalemo influos neatendite la novan direkton de la kristana sekto. Ĉar ili estas eksterlandanoj, ili havas pli facilan sintenon ŝanĝi siajn konvinkojn, ol tiuj tradiciaj loĝintaj ĉiam en la naskiĝloko kaj sen la sama socia evoluo.

La judoj jam estis ricevintaj influojn ekde praaj jarcentoj. Patriarko Abrahamo vivis en Mezopotamio ĉ. 1600 a.K. Moseo ricevis la "leĝajn tabelojn" en Egipto. Post la detruo de la juda regno je 587 a.K., judoj disiris en la tutan orientan regionon, dum okaze de la konkeroj de Aleksandro la Granda (334 a.K.) fariĝas la definitiva heleniĝo de la regiono.

Oni ne havas dokumentojn pri Jesuo en lia propra aramea lingvo. Tiu fakto malhelpas nin pri la kono de la precizaj vortoj de la profeto kaj pri la respektiva signifo.

Oni povas konsideri du fazojn, kiuj influos sur la kristanismon : la unuan helenan fazon, kiu estas tiu de la heleniĝintaj judoj kaj la duan, kiu koncernas ĉiujn helenojn.

Kvankam simpatia kaj kun plibonigitaj ideoj, Jesuo aspektas tradicia homo, rilate la novan formon, kiu okazos kun la heleniĝo de la kristanismo pro la alveno de la heleniĝintaj judoj.

Ni scias ankaŭ, ke hebreoj havis sinagogojn en Jerusalemo, kie estis pli da saĝo kaj uzo de la grekaj lingvo kaj kulturo. La heleniĝo de la kristanismo pere de la heleniĝintaj judoj estas klare videbla okaze de la unua kristana pentekosto. Tiam eble unu apostolo parolis unu lingvon, alia alian lingvon, tiamaniere diversaj eksterlandanoj rekonis la sian, kaj miris kaj akceptis la kristanan mesaĝon. Ĉu okazis nur parapsikologia fenomeno ? Ĉu estis vere supernatura okazintaĵo ? Fakte, tiuj helenaj judoj dividiĝis, unuj kredis pri supernatura okazintaĵo, aliaj pri efekto alkohola de vina mosto. Kaj poste Petro alparolos por defendi sian grupon kaj eksplikos, ke la afero estis vera profetaĵo kiel antaŭe diris profeto Joel.

Pere de la helenaj judoj la kristanismo povis facile disvastiĝi eksterlande, kie ajn ekzistis judaj sinagogoj.

De kiam la romanoj konkeris la helenan mondon, tiuj sinagogoj fondiĝis eĉ en Romo. La juda religio estis permesata laŭleĝe en la romana imperio; ĉar komence la kristanoj estis vidataj nur kiel juda sekto, ili povis facile disvastiĝi sen politikaj problemoj.

La plej granda helena judo, kiu fariĝis kristano, nomiĝas Paŭlo el Tarso (urbo de Antioko, Sirio). Naskiĝinta en romana provinco, pro tio li estas ankoraŭ romana civitano. Al tiu laborema homo, kiu estis akceptita kiel apostolo de Kristo laŭ la aliaj dek du apostoloj, la kristanisma disvastiĝo ŝuldas pli, ol al ĉiuj aliaj dek du kune, kiuj estis esenaj, kiam Paŭlo estis farizeo. Aliflanke, ankaŭ al apostolo Paŭlo la kristana eklezio ŝuldas ian moralisman rigidecon, kiel tiun de la stoika filozofio. Tiu ĉi aspekto estas ne nur juda, sed precipe helena fenomeno, per kiu Paŭlo ŝanĝis la stilon de la kristanismo. Cetere, la leteroj de Paŭlo, kiuj komenciĝas ĉirkaŭ la jaro 50 (do 20 jaroj post la morto de Jesuo) estas en greka lingvo (ne en la hebrea).

La ŝanĝo de la jesua movado estos tiel influata de la helenoj, ke fine la nomo ne estos hebrea, sed helena. En Antioko, tiuj mesiistoj el esena deveno restos definitive nomataj "kristanoj" (el la greka "kristos", traduko de la hebrea "mesio"). Mesiismo estus pli aŭtentika nomo, se la kristanismo ne heleniĝus.

La disvastiĝo de la kristanismo kun samtempa heleniĝo atingis la definitivan stabilecon nur post du jarcentoj; en 313 ĝi fariĝas politike la plej forta inter la multaj religioj de la granda roma imperio. Tiam la heleniĝo jam ne fariĝas pere de la helenaj judoj sed per la rekta kontakto kun ĉiuj formoj de religio kaj de filozofio.

Estas konate, ke jam ĉe la komenco oni diskutis, ĉu la kristanaj viroj devas esti cirkumciditaj, ĉu ne. Jen signifa decido favore de la helenigo - la nejudaj kristanoj ne estu devigataj laŭ propono de Paŭlo.

La gnostika tendenco estis la unua granda heleniga movado, kiu kreis ankaŭ gravajn ideologiajn problemojn interne de la kristanismo. Foje, la gnostikuloj estis konsiderataj vere kristanoj kaj estis eĉ episkopoj diritaj tiaj. Tamen, okazas tuja divido de la du tendencoj; laŭ la kristanoj (laŭ ili definitive restis) Jesuo estas Dio, kvankam kiel dua

persono, kaj veninta reale al tiu ĉi mondo; laŭ la gnostikuloj, Jesuo estas nur meze speciala estaĵo (eono) inter Dio kaj tiu ĉi materia mondo.

Dum la unua ĝis la 3a jarcento, gnostikismo kaj kristanismo kunekzistas foje pacaj sed plej ofte interbatalemaj. Mezepoke, reaperos la gnostikismo sub la formoj nomataj katarismo kaj albigensismo, kiun la katolika eklezio atakos per la kreo de la inkvizicio. Aliaj formoj de gnostikismo ĉiam ekzistantaj estas tiuj nomataj teozofio kaj antropozofio.

La kristana socia penso rilate la riĉecon estas pri ĝia senneceseco, kaŭze de la estonta feliĉo; tiuj konceptoj iom post iom malaperas, sed ne rapide. En la 3a jarcento ankoraŭ estas insista la doktrino kontraŭ la riĉeco, ĉar la kristanoj estas kutime malriĉaj. La riĉeco de la ekleziaj ritoj kaj pompaj ceremonioj de la episkopoj, precipe de la papoj, venos dum la feŭdisma epoko.

(daŭrigota)

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

Meva Maron :

ARKANOJ KAJ URTIKOJ

Fascinas min l'Ergota felietono pri Uspenski : saĝaj vortoj - sed tamen tro da teorioj, ĉu? Mi legas ĝin scivole, ĉar "Bosniaj elegioj" pensigis min pri bogomiloj kaj kataroj ktp.

Ĉu, mi demandas, se la mondon kreis diablo - aŭ se Dio cedis al neceso, laŭ Simone Weil - rezultus malpli arogganta hombildo (laŭ kristana tradicio tro glora kaj samtempe tro mizere kulpa; sen lia fuŝo kune kuŝus ja leono kaj ŝafido...), pli kongrua kun ekologia sinteno ? En aliaj vortoj, se - laŭ pli kabala bildo - la kreanto frakasis vazon, ĉu la splitoj (flagroj de l'pralumo) troveblas nur en homoj aŭ en ĉio kreita ?

Mi demandas. Sed respondas tre malsimplaj teorioj, kvazaŭ el vizioj. Pri ekzemple 48 reguloj de Gurĝo. Mi akceptas la mistikon de kvakeroj kaj Simone Weil, sed elteni viziulojn - malfacile! Ĉar - kristanojn pretajn trafi *per*

biblicitaĵoj, profetajn pordofrapojn pri ĝisdata mondofino, mormonojn kun homforma Svedenborga Dio : ĉiujn mi tro bone konas!

Mi trovis tamen unu (unu!) simpatian viziulon. Eble vi ne konas lin, do mi rakontos. Kaj eble unu tia simpatio helpos pri aliaj. Historio ligas bogomilojn al kataroj, eble al kvakeroj, ligas Svedenborgon al Blake... kabalon al Boehme? Svedenborgon al Mormonoj? Eble ĉiuj (krom kabalo, kompreneble) iel penas legi la kristanan palimpseston kaj diveni la subtekston, do ĉiuj iasence kongruas? Eĉ la branĉoj, kiujn mi nomus silentema (Simone Weil, kvakeroj) kaj babilanta (pri ies vizioj).

"Al tiuj, kiuj, demandinte, scias./ Al tiuj, kiujn preĝoj kondukis mediti pri l'origina lingvo./ L'aliaj, kiuj ŝtelas ĝojon kaj doloron, sciencon, amon - nenion komprenos./ Por kompreni necesas rekoni l'objektojn... esencaj vortoj kiel pano, salo, sango, suno, tero, akvo, lumo, ombroj, nomoj de metaloj./ Ĉar tiuj nomoj estas nek fratoj nek filoj, sed patroj de l'objektoj kiujn oni sensas..." Jen vortoj el psalmo de O V Miloŝ (1877-1939), litova diplomato kiu verkis en la franca kaj vizion spertis la 14-an de decembro (mian naskiĝtagon!) 1914, post kiu li "arkane" verkis. Mi nomos lin O V (ĉar li vidis en la vizio ovan sunon).

Li konsciis, ke li verkas malfacile. Laŭ alia psalmkomenco li avertas leganton, ke se li mem (O V) aŭdus tion, kio sekvos, de kreito, li ne kredus. Admirinda modesto! Sed tamen: li pretendas scii, kion mi ne povus eĉ kompreni... "Kaj mi diris: Jen mi estas, sendu min. Tiam Li diris: Iru kaj diru al tiu popolo: Vi aŭdos, sed ne komprenos; vi vidos, sed ne rimarkos", raportis jam Jesajo, tio ŝajnas nepra sperto de vera profeto, tiu devo surdigi orelojn kaj blindigi okulojn - sed iel neprofetoj devas trovi la profeton aŭtoritata por elteni tion. Mi tro ofte beas, veas "ĉu nur tion?" *("loki finan kosmon (ne senfinan) en la Nenion"???)* L'ondrulitaj ŝtonetoj, kiuj brilis sur marbordo - ho ve, velkis.

La vizio havas daton, sed okazas kvazaŭ ekster spaco kaj tempo, kroĉita kaj kroĉebla al nenio; li parolas fremdan lingvon per konataj vortoj. *Per profunda murmuro terura kaj bela / saĝaj lokaj abeloj / instruos forgesitan lingvon (pezajn tremajn silabojn malhele mielajn)..."*

Jes, O V verkis poemojn, ne nur psalmojn. *"Ni nutros vin per pano, mielo kaj lakto"*, li promesas, en verso kiu same sonas en l'originalo. *"Ne fuĝu: eniros verdaj ombroj tra fenestr' aperta."* Kaj per la poemoj mi pli proksimiĝas la viziojn. *"L'aferoj dormis en fermitaj libroj"* - necesas nur reveki ilin! *"Kun vazo da lumlakto sur la ŝultro"* memoru (memoru!) ke tro forte radianta lumo frakasis vazon - kaj rezultis materio, ties splitoj... Sufiĉas kelkaj vortoj por reveki prememoron pri l'eterna! Sin turni for de l'ombroj en platono kaverno kaj rimarki - lumon.

Miloŝ vidis - kaj priskribis la viditan. Ion kiel eble plej klaran, sed apenaŭ komunikeblan. Li vidas siajn vortojn tiel klare, ke al mi li malfacile montras ilin. Li ripetas, konstruante pli kaj pli barantan mondon inter ni. Kvazaŭ mi en fremda lando opinius, ke sufiĉas laŭte diri ion mialingve... La vizio lin katenas, vortoj lin blindigas. (Mi preferas la kabalan anekdoton pri paŝtisto, kiu volis preĝi en arbaro nokte, sed forgesis ĉiujn preĝojn, ne kunportis libron - do ripetis l'alfabeton, ĉio ja konsistas el literoj... Kaj la preĝo efikis).

Dum versoj tamen sorĉas: "Kristala birdo dolĉgorĝe mlidiras / en somnambula jasmen' infanaĝa: / levante ĉielarkon mi eniros..." - mi devas diri, ke mi kredas lin, nur ĉe l'ukraino Volodimir Svidzinski mi esperis trovis ion tian.

Mi kredas, ke li vidis, ĉar li trovis malbanalajn, freŝajn vortojn por priskribi sian domon en litova bieno. Czesław Miłosz, lia nepo, citas en "La lando Ulro" tian ĉi komencon de perdita romano: "*... tri grandaj najloj, triangule, kiuj pinglis iam la flugilojn de nun polva vesperto...*" (laŭ sentenco li sopiris tiel murdi vortojn!) *"Francaj reĝoj kaj litovaj princoj kune per portretoj : Sobieski, Stanisław Leszczyński, Poniatowski, korinkline francoj. La portretoj iam certe servis pafcele al rajdistoj svedaj aŭ moskvaj, ĉar la larĝajn ŝultrojn kaj severajn fruntojn truis vundoj diverskalibraj, en kiuj foje brilis ora tineo, rampis ferkolora onisko aŭ minacis diamantflagrante antikva araneo..."*

Mi preferas do *"aŭskulti kion l'ombro diros al urtikoj"*. Flustri tiel foje pli efikas... *"Sub muska mur' rezervu - dum supre lacertoj / l'urbon Ariel montras en puraj vaporoj - / al am' amara angulon / amikan al frido, / humido kaj silento; kaj dum virgulino / kun surbruste la*

signoj de Lumo kaj Justo / kondukas min permane, la tristo surtera / rekonu min, salutu urtiko kaj kardo..." O V montras al mi padon ĝis l'urtikoj kiuj kreskas sub la muro - de la nova Jerusalemo?

Kaj - vidu, kion mi trovis! - *"Ni nutros vin per pano, mielo kaj lakto"* postvizie; sed antaŭ la vizio li verkis *"Vi nutris min per pan' humile nigra, per lakto kaj miel' sovaĝa."* Nur l'adjektivojn li forstrekis! Do eble poezio mem divenas... *"Lepor' blankventra fuĝas sur l'unua neĝo / per muta mir' frapante niajn tristajn korojn"* aŭ ĉu tio trafas ĉar la nevo de O V, la menciita Czesław, skribis en 1937 ke sunsubire "Lepor' subite antaŭ ni ekkuris / kaj unu el ni montris ĝin permane..."

"Disverŝi superfluajn movojn en la fratan koron de la ŝtono... Vorton kaj sonon ĝuste loki kaj tempi en poemo, muskolon kaj paŝon en danco... ritmo esprimas plej alte, kion ni surtere nomas pensi..." Ne miskomprenu min: al mi tre gravas la mistika flanko - aŭ, se vi preferas, mistika kerno - de O V. Sed ĝi gravas laŭ mi tiel, ke ĝi montras ion pri l'poemoj, ke oni povas fidi sin al' ili, la poemoj siavice pruvas ion pri l'vizio, ke mi povas fidi ĝin (mi esperas, ke spirala argumento, ne nur cirkla - ni promenas en dangera tereno!), la vizio donas fidon pri kongruaj vizioj de aliaj... Ktp. (Mi sentas, ke mi mem - malpli kuraĝe - prisilentus vizion).

(Okra araneo, tiel eta ke mi vidas franĝan punkton krabli kiel krurmovanta korpo, rondiras aŭ pli ĝuste kvadratiras preskaŭ lastan paĝon de la poemaro; ne volante premi ĝin en la marĝenon, mi dečifras inter la hebreaj nomoj *"kutimi al plormura salo" "sub kruda lano de nebulo" "Ek, murlekanta greg'! Amaraj heĝoj..."* - kaj memoras pri paŝtisto - rimas 'tristo' - *"krudlane vestita / dum čerkon de l' amata najlas milda pego / kaj ran' en mutaj kanoj preĝas..."* Bogomiloj kaj kataroj surdeklive, de paŝtisto al paŝtisto, fidon transdonis - kaj mi ŝatas montojn!)

Trafa vorto elvokas tutan teorion čar ĝi vekas prememoron. *"Biblio, Goethe, l'inko kiu tempodoras,/ papero, blankulino kiu legas pensojn..." "Jen la muro sen kruco, la tablo, la libro / fermita! Se maleblo frapus če l'fenestro / kiel froskora rubekolo - kiu / malfermus?"* Bildo aperas sur la filmo: el l'Apokalipso... *"Kiu estas inda malfermi la libron kaj rompi ĝiajn sigelojn? ... Ne ploru: jen leono venkis,*

por malfermi... Kaj mi vidis Ŝafidon kvazaŭ oferbučitan..." Multe pli efikas tiel post nescio kompreni tekston... Ču diri ke degelis prujno sur fenestro, ke videblas nun - dum mi admiris sagan prujnarbaron?

Mi sekvis padon ĝis la muro. Trans kiu brilas eble suno sur deklivoj, eble turoj de la nova Jerusalemo... Sed mi restas sub la muskaj blokoj. Mi staras če l'sojlo. Krepuske. Preskaŭ preta levi sojloŝtonon sub kiu - kiaj insektoj svarmos?

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

"SE MALPROKSIMAS VI..."

Kiam venos nokto milda
Vi elhejmo iru al
Flustro de l'mister' aminda
En la kosmo ĝeneral'.
Iru en la kampon vastan
Kaj sub stela simfoni'
Aŭdu mian voĉon gastan
En ventspira emoci'.
Kaj komprenu am-konfeson
En muzika nokt-silent'
Kaj konsciu la neceson
Plensinceri al la vent'.
Kaj eldiru ĉion karan,
Ĉion koran el l'anim' -
L'vento rompos dison baran
Kaj kunigos ambaŭ nin!

Gafur Gazizi, Baŝkirio-UFA
El la poemkolekto "Serenado al sereno", 1985
"EDITIO PRINCEPS".

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

SOLVO de la krucvorta enigmo de n-ro 81 :

Hor.: 1. HOMARANISM. 2. ABOLICIO. 3. RORI. ITALI. 4. ILUMINI. AZ. 5. SAVOZONO. 6. GLANA. IRA. 7. II. INA. AĴO. 8. SKUE. DEKOR. 9. TEARBETO. 10. INTERNULEJ. 11. NOO. RALIKO.

Ver.: 1. HARINCISTIN. 2. OBOL. LIKENO. 3. MORUSA. UATO. 4. ALIMA NIERE. 5. RI. IVAN. BRR. 6. ACINO. ADENA. 7. NITIZI. ETUL. 8. IOA. ORAKOLI. 9. LANAĴO. EK. 10. MAIZO. OREJO.

Responde al la "dosiero" J. DEKER aperinta en L! 81, p.35-42.

1) La artikolon de J. DEKER rifuzis la redaktoro de **Sennaciulo** K. BARKOVIĈ, kun la unuanima aprobo de la Plenum-Komitato de SAT. Same la noto redaktita de Ivo PEYRAUT estis komplete aprobita de la P.K.. Se temas pri fantasmoj, estas tiuj de la P.K.

2) Post la apero de la dosiero de J.DEKER en **Laŭte**, ni daŭre restas ĉe niaj konvinkoj. Ni precizigas ilin.

Antaŭ ol oni revu pri la kreo de sennacieca mondo, devas malaperi ĉiuj premoj de iu popolo, nacio aŭ ŝtato super alia popolo, nacio aŭ ŝtato. Tion montras klare la eventoj ekde 1945 : Hindio emancipiĝis de Britio, Indonezio de Nederlando, Alĝerio de Francio ktp. Inter 1940 kaj 1945, Eŭropo batalis kontraŭ la germanaj invadistoj. Nuntempe la orientaj eŭropaj landoj kontraŭstaras la sovetian politikon, ktp.

En la mondo restas kelkaj spuroj de la klasika koloniado : Nov-Kaledonio, Ĝibraltaro, Namibio ktp. Ĉiuj tiuj landoj, kiel la aliaj, meritas sendependiĝi*.

Kaj la Plenum-Komitato de SAT (espereble ankaŭ la tuta SAT-anaro) aprobas tiujn luktojn, kiuj estas necesa ŝtupo antaŭ agado favore al mondunuiĝo. Sennacieca mondo kreiĝos nur de memstaraj homoj, kaj koloniitaj homoj ne estas memstaraj. Ĉiu decidu mem pri si mem. Tion dirante, ni havas la impreson diri banalaĵojn en nia SAT-medio. Pro tio ni daŭre miras, ke kamarado DEKER malsubtenas la sendependiĝon de subpremitaj popoloj.

La Plenum-Komitato de SAT

P.S. : Dum la kongreso en CAMPOS DO JORDAO, neniu aludis pri k-do DEKER.

* Dum la franca novembra referendumo en 1988 pri Nov-Kaledonio, la plejmulto aprobis la registaran planon, kiu antaŭvidas la eblecon de sendependiĝo de Nov-Kaledonio (posta Kanakio) post 10 jaroj.

Promenado en Albisola

Hodiaŭ estas bela tago. Ne blovas vento kaj malgraŭ la tria dimanĉo de oktobro, la suno viglas, preskaŭ ŝajnas somero.

Teresa, Michele kaj mi iras al la kokejo de la monaĥinoj kaj dum nia irado de tempo al tempo ni vidas akridon.

Michele konsilas mortigi ĝin, ĉar ĝi endanĝerigas la kulturojn de la monaĥinoj. Mi bedaŭras por la kulturoj, sed laŭ mi akrido ne povas tiom malutili. Male, mortigi ĝin, signifas estingi vivon kaj mi ne volas estingi eĉ vivon de akrido.

Kaj tiam mi rememoras ion, kio okazis al mi antaŭ kelkaj jaroj. Mi iris al la Pola Ambasadejo pro vizo kaj, sekve, mi iris ankaŭ al la Ĉeka pro la transiro. Mi ĵus revenis sur la aleon per aŭtobuso atingi mian loĝejon, mi vidas vermon griz-kaŝtan-koloran, dikan, malrektan, naŭzan... Sed por savi vivon, pere de mia bastono mi penas malproksimigi la vermon de la mezo de la aleo, timante ke ĝi mortos sub aŭtomobilo aŭ sub la aŭtobuso mem. Mi malproksimigis ĝin, jes, sed kun vizaĝo maldolĉa, preskaŭ turnata. Poste mi daŭrigas la vojon ĝis la aŭtobusa haltejo... Tamen mi pensadas: "Jes, vi savis, aŭ vi klopodis savi ĝin, sed kun kia mieno! Nur por ke ĝi ne pereu! Sen simpatio, sen entuziasmo, sen ĝojo. Se ĝi estus birdeto, sciuro, papilio, kateto, nome gracia besteto, vi eĉ karesus ĝin. Kian kulpon havas la vermo pro sia malbeleco? Jes, vi faris al ĝi donacon, malgraŭ la malbeleco - kaj tio jam estas io, - sed la donacon pli ol al ĝi vi faris al vi, ĉar vi ŝatas la VIVON..."

Tiam mi sentas la devon turni min, rigardi la vermon, rideti al ĝi.

Vere, mi ridetas al ĝi, ĉar tio estas gesto, kiu valoras. Mi taksas la vermon ne plu estaĵo malbela kaj naŭza, sed estaĵo, kiu meritas geston de solidareco kun la naturo, sendependa de la bela aŭ malbela aspekto.

Al Michele plaĉas mia rakonto. Teresa nur ridetas. Ĉu

ankaŭ pro ŝato aŭ ĉu nur por kontentigi min?

Ripozante poste sur benketo laŭlonge de la vojo, ni ekkomentas religiajn temojn. Kaj intertempe vice iras ses katoj, kiuj observas nin, kvazaŭ demandante pri nia identeco. Unu, blanka kaj nigra, kun helaĵoj, ne kuraĝas alproksimiĝi malgraŭ la deziro.

Tiuj ses katoj, malsimilaj korpe, kun diverskoloraj vestoj, ridetigas min, ĉar mi sentas, ke mia koro konsideras ankaŭ la katojn vagabondajn. Ili komprenas, ke ni ne ĝarus malbonon. Ili ne ĝuĝas, tamen ili ne tro alproksimiĝas. "Fidi estas bone, malfidi estas pli bone."

Albisola, 25.10.1988 **LINA GABRIELLI**

"MISIO"

Al B.G. Kolker

Soldato estas mi en la Armeo
gvidata de senkorpa general'.
La generalo estas la ideo
de Zamenhofa nobla ideal'.

Mi ĝojas esti nur malgranda parto
de batalantoj por komuna cel'.
Mi ĝojas aparteni al l'standardo
de ĉiamvoka, ĉiamverda stel'.

Mi estas nur soldato ordinara,
sed marŝas mi en grava granda front'.
Mi estas en la maro solidara
nesensignifa kaj nesola ond'.

Ne vane mian forton mi fordonos
por la triumfo de l'ideo sankta,
se super tombo mia iam tondros
rekrutaj ĵuroj je batalo esperanta.

Gafur Gazizi, Baŝkirio-UFA

KRUCVORTOJ de Sfinksido

(**s.f.** = sen finaĵo!)



Horizontale :

1. Iam eŭnukoj konsistigis la papan. **2.** Parto de matematiko. **3.** Verba sufikso. - Ne direktenda al infanaĵo. **4.** Muziknoto, en la franca sistemo.- Lingvaĵo, kiu ne kurigas la famon. **5.** Divana.- Interjekcio uzata por esprimi iom malŝatan senzorgecon. **6.** Freŝe.- Ne organizita grupo. **7.** Kampara. - Ĝi ne estas eco de mono (s.f.). **8.** Oni trovas tie la plej altajn tersuprojn. **9.** Likvaĵo uzata en la fabrikado de artefaritaj farboj (s.f.). Grupo da individuoj, interne de la specio, kun apartaj komunaj karakteroj heredaj (s.f.). **10.** Ĉefliteroj de la presisto de la Unua Libro (Vd. Enciklopedio de E-o).- Unu el du. **11.** Uzata por fari pacan bombon.- Nomo de litero uzata interalie kiel simbolo de eta monunuo.

Vertikale :

1. Nur Esperanto povas forigi la lingvan.- Japana poemeto (s.f.). **2.** Aŭstralia mamulo, kiu demetas ovojn. **3.** Ceremoniaro (s.f.).- Ellasi ovojn. **4.** Verba sufikso.- Verda kiel duobla aluminia kaj berilia silikato. **5.** Tendaro de araba ĉefo (ne en PIV)(s.f.).- Iu ajn krom mi kaj vi (s.f.). **6.** Rilata al daŭra muskola kontrahigo.- Herbo, kies junaj folioj kaj ŝosoj estas uzataj por saŭcoj.- Grekaj sprituloj, laŭdire. **7.** Ĝi estas trastrekenda! **8.** Ĝi certigas la likimunecon de la piŝto en la cilindro (s.f.).- Kulti. **9.** Revolucia monato.- Funga ĉelo (s.f.) **10.** Japana teatraĵo.- Greka is-tempo.

Ĉiu voĉo

Valo :

PRI MALSIMILECO

Ĉu eblas daŭrigi la debaton prezentitan en L! 81 ?

Garolo parolis pri "rasoj". Mi observas, ke tiu vorto estas sensenca laŭ la modernaj biologoj kaj antropologoj. Jakelino parolas pri "etnoj", kaj rimarkigas, ke la "rasaj" diferencoj malaperas, se diversdevenaj infanoj estas edukataj en sametna medio.

Mi konsentas, ke tio, kion Garolo nomas raso kaj tio, kion Jakelino nomas etno, kreas inter la homoj diferencojn kaj diversecon. Tio estas ja fakto. Laŭ mi bedaŭrinda fakto : ĉar troa konscio pri propra raso aŭ etno facile kondukas al rasismo.

Mi ofte konstatis, ke inter multaj judoj ekzistas rasismo, ne nur pro la suferitaj persekutadoj kaj pogromoj, sed precipe pro la kredo pri supereco de la "elektita popolo" - do pro religia judismo. Ekzistas ankaŭ rasismo de nigraj afrikanoj en eks-kolonioj, kaj ankaŭ interna rasismo, pro kiu diversaj triboj interbatalas. Ĉu ne pro tio, ke nigraj afrikanoj, same kiel blankuloj, judoj, kristanoj aŭ muzulmanoj, kredas ĉiu pri la supereco de sia raso aŭ de sia etna kulturo, kaj ame flegas tiujn apartaĵojn, anstataŭ strebi al tuthomara unueco? Al ĉiuj rasismoj, etnismoj kaj naciismoj ni kontraŭmetu la homaranismon de Zamenhof, la sennacieismon de Lanti.

Al Jakelino :

Miaj geavoj parolis pli en okcitana ol en franca lingvo. Miaj gepatroj pli en franca ol en okcitana. Por mi la okcitana, kiun mi komprenas kaj laŭokaze parolas, estas kvazaŭ fremda lingvo. Frederi Mistral mastris egale la provencan kaj la francan. Mi trovas min tiel hejme en esperanto kiel en franca. Nu, tio ĉi estas ankoraŭ escepta, kaj la plimultaj francoj parolas kaj pensas nur en franca lingvo. Tio estas frukto de natura evoluado (tre influita de la ŝtata

kolektivo). Mi ne vidas motivon, por ke tiu evoluado haltu ĉe tiu ŝtupo.

Iom post iom la etnaj lingvoj kadukiĝas kaj mortas, (kiel mortis la antikvaj lingvoj, egipta, greka, latina) fronte al regado de la naciaj. Kelkaj (en Francio la vaska, la kataluna, la korsika, la alzaca) pli rezistas ol la okcitana, la bretona aŭ la nordfrancaj dialektoj), sed la direkto de la evoluo estas tre neta. Eble ĝi eĉ kondukos en Eŭropo al flankenigo de la franca kaj de aliaj nacilingvoj fronte al hegemonio de la usonangla (tamen ne favore al disvastigo de la kulturo reprezentata de Ŝekspiro, de la anglaj klasikaj verkistoj kaj de la modernaj usonaj kaj anglaj.)

Al Garolo mi rimarkigos, ke la diverseco de la rasaj aŭ etnaj kulturoj devenas ĝuste de la kolektiva medio, en kiu la individuo estas edukita. Nun tia kolektiva medio estas nacia. Ni strebu al kreado de sennacieca medio, en kies etoso la individuo elvolviĝos en sia persona diverseco, ne en diverseco de rasaj aŭ etnaj aŭ naciaj kolektivoj.

Jakelino tre bedaŭrus, se la etnaj aŭ naciaj kulturoj malaperus per kunfandiĝo en unuforma sennacieca kulturo. Sed la antikvaj kulturoj (greka, latina) ne mortis kun la koncernaj lingvoj : same kiel ili estas transportitaj en la modernajn naciajn lingvojn, la nunaj naciaj kulturoj estas transporteblaj en la lingvon internacian. (Ankaŭ la ankoraŭ ne tute mortintaj etnaj provincaj kulturoj : tial mi esperantigis el la provenca originalo la **"Poemon de Rodano"** de Mistral).

Valo :

ANKORAŬ PRI RELIGIA FANATIKECO

Ĉu estas jam tro malfrue por paroli pri la "Satanecaj Versoj"?

En Parizo, en marto, okazis debato pri tiu temo inter pluraj muzulmanoj, judoj, kristanoj kaj ateistoj. Ĉiuj malaprobis la vokon al murdo. Eĉ unu ajatolaho, kiu tiel metis sian vivon en danĝeron (ĉar, kvankam la polica enketo ankoraŭ ne finkonkludis, verŝajne la du moderaj muzulmanoj murditaj en Bruselo estis viktimoj de islamaj integristoj).

La islamanoj per akrobata dialektiko klarigis, ke fakte Homejni ne kondamnis Rushdie, kiel oni konkludis per mis-

kompreno, pro malĝusta traduko : li nur "diris la leĝon" : la blasfeminto estas kondamnita de Dio mem en tiu ĉi mondo kaj en la alia, laŭ la propraj vortoj de la Korano, kiuj nur reproduktas fidele tiujn de la Biblio (kaj la Biblio estas fundamenta libro por la kristanoj kiel por la judoj kaj la islamanoj). Eble tial la ĉeestantaj kristanoj (krom tamen la protestanta), same kiel Monsinjoro Decourtray kaj S-ro André Frossard*, "komprenis" la suferon de la islamaj kredantoj pro la blasfemo de ilian indignon kaj koleron kontraŭ la blasfeminton. Same la islamanoj komprenas, ke la kristanoj estos ofenditaj per la filmo de Scorsese. Tiel esprimiĝas solidaro inter la iranaj fanatikuloj kaj la kredintoj de la Inkvizicio, eĉ se tiuj ĉi feliĉe evoluis. Ni ne forgesu, ke en Francio, ankoraŭ en la XIX-a jarcento, la katolika reĝo Karlo X-a releĝigis la mortpunon pro blasfemo, abolitan de la Revolucio.

* André Frossard, aŭtoro de fama libro: "Dio ekzistas, mi Lin renkontis".

J. MANCEAU :

La demando pri Novkaledonio

En L! n-roj 78a kaj 80a aperis de Bernard AUNIS kaj Gisèle GIZARD respektive, notoj, kiuj aludis Novkaledonion, sed tute ne klarigas la problemon, ĉar problemo estas. Mi ne havas finkuiritan solvon, sed mi tamen kredas, ke estus utila strebi al ĝusta elmeto de la donitaĵoj mem de la problemo. Laŭ mi, la malkonsento inter kanakoj (ne ĉiuj), kaj franc- aŭ eŭrop-devenaj gentoj originas en ties malsamtempeco, kiu evidentiĝas pere de iliaj malsamaj vivtenadoj. Tion mi provos montri, sed por tio necesas reveni al "antaŭ la diluvo" kiel en Racine-teatraĵo...

En la komenco de la homaro, la homoj, kiuj sentis sin malfortaj kontraŭ la bestoj kaj la naturo grupiĝis por sia protekto en hordojn. Tio favoris la konservadon de la fajro, la ĉasadon de la bestoj, ĉu por unuigi la fortojn por ataki la fortajn bestojn, ĉu por alpeli la malfortajn, cetere, tia grupiĝo favoris la ŝirmadon de la virinoj kaj de la infanoj. Tiuj grupoj ĉasadis kaj plukis, pro tio ili bezonis tre grandajn terspacojn kaj eĉ translokiĝon por pluki kaj ĉasadi plu. Ili estis maldensaj; kaj grupo kvazaŭ ne renkontis alian grupon; nur kiam ili estis pelataj de la malsato, ili atakis

alian hordon kaj manĝis la "malamikan viandon". Kompreneble, en tiuj idealaj tempoj, ĉio estis komuna, interŝanĝado eĉ ne ekzistis; unu hordo estis aŭ devis esti aŭtonoma kaj vivi aŭtarcie.

La homdenseco de tiuj tempoj estis tre malalta. En la jaro 1000a, kiam Afriko estis virga de blankula ĉeesto, loĝis tie proksimume 50 milionoj da homoj sur teritorio de 30,25 milionoj da km², kio estas ĉirkaŭ 1,7 enloĝanto en km². Tio tradukas la radikalan ŝanĝiĝon en la vivtenado, per ĉefe malrapida kresko de terkulturado.

Prefere oni rimarku, ke ĉiam estiĝis tensioj inter brutbredistoj kaj ĉasistoj kaj terkulturantoj : la unua fama ekzemplo estas la malakordo inter Habelo ĉasisto kaj brutbredisto kaj Kaino terkultivisto. Pli poste, famaj estis ankaŭ en Usona Far-West la murdoj inter farmistoj kaj brutbredistoj, kaj ankoraŭ pli proksime, la en Malio disputoj inter terkulturistoj kaj la nomadaj Tŭaregoj.

Ni nun prenu la ekzemplon de Franclando : dum la prahistorio, estis inter 500 mil loĝantoj kaj 1,5 milionoj sur 543 000 km², kio estas de 1 enloĝanto/km² ĝis 3 enl./km², kiam vivtenado estis plukado, ĉasado kaj fiŝkaptado apudmare. Kun komenco de agrokulturo, kaj ni scias, ke niaj prapatroj la Gaŭloj estis lertaj terkulturantoj, la loĝantoj nombris inter 5 ĝis 10 milionoj, kio estas 9 enl./km² ĝis 18 enl./km².

La uzado de la bestoj, la granda eltrovo de ĉirkaŭkola kolĉeno por la ĉevalo kaj la azeno, la komenco de la praktikado de la trijara kulturalterno ebligis vivtenadon de ĝis 20 milionoj da loĝantoj. Tio estis drasta limo, ĉar se malfeliĉe okazis maltaŭga vetero, tuj ekestis grandaj malsatoj, kiel hodiaŭ en la dirita tria mondo... Tio daŭris ĝis la komenco de la 19a jarcento, kiam necesis 0,02 km² da kultivebla grundo por nutri nur unu personon, kaj la kultivebla grundo en Franclando estas proksimume O,4 milionoj da km², kio ebligas maksimume 20 milionojn da homoj. Por la tuta areo, tio estas 20 : 0,543 = 37 enl./km², kaj tio estis, ni rediru, severa limo. Danke al la sciencaj, teknikaj, biologiaj eltrovoj, ni nun facile nutras (kun superabundo) 55 milionojn da loĝantoj, kio estas 101 enl./km² ĉe la sojlo de la 21a jarcento.

Tiuj progresoj ebliĝis ankaŭ ĉar ĉiu agrokulturisto far-

iĝis laŭgrade proprietulo sendependa, kiu iniciateme laboris unue por si mem kaj sia familio. La influon de tiu nura sinteno kaj eblecoj oni povas taksi per komparado kun la rezultoj de Sovetio kun samaj teknikaj rimedoj sed malsama vivsistemo.

En Japanlando, 370 000 km² ebligas vivon por 110 milionoj da loĝantoj, kio estas apenaŭ ne 300 enl./km². Ĉar la japana grundo estas malriĉa, oni tuj vidas kiom Japanlando dependas de la interŝanĝoj kun la cetera mondo, kaj kiom ĝi povas aspiri al pli da grundo...

***

Ni nun esploru la donitaĵojn pri Novkaledonio.

La grundo sumas 16 750 km² kaj tie vivas 51 000 kanakoj sur la dependaj insuloj kaj sur la granda insulo, meze de la veprejoj, ĝenerale ekstere de la urboj, kie plejmulte vivas la eŭropanoj : en urbo Numea loĝas jam 42 000 homoj plejparte blankaj (kun mestizoj kaj hindoj).

Se oni rigardas la urban areon neglektinda, tio estas por la kanakoj 51/16 = 3,18 enl./km², kio situas inter Botsvana (1 enl./km²) kaj Mali (4 enl./km²), t.e. malmulte, se oni memoras, ke en Mali estas dezerto. Tio montras do, ke la insulo estas kvazaŭ malplena kaj povas logi sudaziajn popolojn ekde Japanlando ĝis Baharato (Hindio).

Nun ni esploru iomete la historion de N.K., kio povas eble klarigi la nunan situacion.

La insulo estis malkovrita far la sama kapitano COOK, granda vojaĝanto (kiun vi povas ankoraŭ kontakti, se vi intencas vojaĝi... aŭ lian filon?) en la fino de la 18a jarc.: 1774a. Tio estas iom pli ol nur 200 jaroj! Tiam la insulo estis loĝata de sovaĝuloj, kiuj praktikis ĉasadon, plukadon kaj hommanĝadon (kiel niaj prauloj de antaŭ almenaŭ 3000 jaroj. Oni forgesis la insulon dum preskaŭ jarcento, kiam la franca ŝipo ALCOMENIE, kies ŝipanaro verŝajne ne legis COOK-an libron, tie albordiĝis pro tempesto. La indiĝenoj montris ŝaton laŭ siaj moroj al la blankuloj, tiom ke ili amasbuĉis ilin kaj ilin manĝis. (Tiun informon oni nun pudorplene kaŝas). La faktoj tamen disfamiĝis, kaj en la j. 1860a, vicadmiralo FESVRIER-DESPOINTES venis kun ŝiparo, invadis la insulon kaj deklaris ĝin kolonio de la franca tria imperio.

Oni komencis tiam sendi tien krimulojn kondamnitajn al

punlaboro, pro la danĝero de eskapprovo. En la jaro 1871a oni sendis politikajn kondamnitojn, nome unue la ĉefojn de la Pariza komunumo. En la jaro 1897a oni findecidis fermi la punlaborejon, kaj alvokis al liberaj enmigrantoj.

La blankuloj iniciatis minindustrion kaj siderurgion, ĉefe pri nikelo, sed ankaŭ pri kobalto, kromo, kaj iom da nesufiĉa karbo. Ili enportis brutojn, ĉar antaŭe ne estis en N.K., kaj ekkulturis kaorilignon, kafon, maniokon, kopron kaj odordonajn kreskaĵojn, t.e. njaŭlion (malgranda eŭkalipto), citronelo kaj vetivero, sed entute, la manĝkulturoj ankoraŭ ne sufiĉas. Entute, tiuj novaj envenintoj kuraĝe laboris sen domaĝi la penon.

Dume, plejparto de la kanakoj, krom la hommanĝado, daŭrigis siajn kutimojn, t.e., ke ili daŭre vivadis tribope, daŭrigante la plukadon (ne plugadon!) kaj ĉasadon; pro tio ke neniu el tiuj komunumanoj havus intereson kultivi la teron, ĉar ĉetempe de la rikolto, ĉiuj venus kaj prenus kion ili bezonas sen atento al la laboro farita, tiom ke la iniciatulo neniam repagiĝus de sia peno, do, kial strebi al laborpeno? Ne miriga do estas la ekzisto de grandaj malsamecoj en la vivnivelo inter tiuj kanakoj, kiuj sin vivtenas kiel antaŭ tri mil jaroj kaj la aliaj, blankuloj aŭ ne. Tiu malsameco naskas envion, sed oni ne povas "havi samtempe la buteron kaj la monon de la butero", t.e. havi la avantaĝojn de civilizacio kaj sin vivteni kiel niaj praprauloj...

Tio klarigas ankaŭ kial kanakoj plendas pri la laŭ ili nesufiĉa grundo, ĉar ili vivas de ĉasado kaj plukado kiel niaj prauloj de prahistorio; kiel mi diris dekomence, vivas kune en N.K. homoj, ĉefe blankuloj, sed ankaŭ mestizoj, malajoj, hindoj, eĉ kanakoj de la 20a jarcento kun kanakoj de la miljaroj antaŭ Kristo. (Mestizoj estas jam multaj, ĉu ekzemple oni scias, ke TCHIBAOU mem estas duone japana?)

Ĉu oni kredas, ke tio povos ankoraŭ tre longtempe daŭri, mi tion ne kredas, ĉar en la daŭro, la bovo kaj la traktoro, la ĉevalveturilo kaj la aŭtomobilo, la ĉevalo kaj la trajno ne povos pli bone kunekzisti ol la ŝtonepoko kaj la 20a jarcento.

Sed, kiel mi diris ankaŭ dekomence, mi ne scias la solvon, mi scias nur, ke ĝi pli-malpli frue kaj pli-malpli rapide okazos.

Se la francoj foriros, certe estas, ke aliaj 20-jarcentuloj de Sudazio (versâajne) envenos kaj la rezulto estos tute sama por la Kanakoj, nur ke eble ili estos laŭ sia vidpunkto ankoraŭ pli malbone traktataj.

Kompreneble, la Kanakoj povas argumenti, ke ili ne vokis nin, sed same povus la Persoj kontraŭ la Helenoj de Aleksandro, la Gaŭloj kontraŭ la Romianoj, la hispanoj kaj nordafrikaj berberoj kontraŭ la araboj, la amerikaj Aztekoj kaj Majaoj kontraŭ la Hispanoj kaj la Portugaloj, la tibetanoj kontraŭ la Ĉinoj, la Mongoloj kontraŭ la Rusoj, la Maorioj de Novzelando kontraŭ la Angloj, la Ainoj kontraŭ la Japanoj, oni povus senfine daŭrigi la liston, ĉu ne? Sed tio estas faktoj, kiuj pli-malpli kaŝe ankoraŭ daŭras, kaj kontraŭ kiuj oni malmulte povas fari, des pli ke la monda logantaro ankoraŭ senĉese kreskas. Mi sincere kredas, ke la sola bona solvo por la kanakoj estas laŭpove adaptiĝi, se eble kun siaj apartaĵoj al la nuna epoko.

Jakelino :

PRI LA SANKTA FONDINTO DE S.A.T.

Mi opinias, ke la artikolon de Deker la Plenum-Komitato* de SAT devus, ne nur ne rifuzi, sed eĉ inkluzivi kiel aldonan ĉapitron en la venontan eldonon de la Manifesto de Sennaciistoj. Tiel ĉiuj SAT-anoj komprenus, kiaj estas la naturaj sekvoj de la ideoj de Lanti.

Sennaciismo tia, kia ĝin difinas PIV, havas kiel ĉefan celon, ke la tuta homaro havu nur ununuran kulturon. Kiu kulturo indas fariĝi la tutmonda? Kompreneble, la kulturo de la blankhaŭtaj eŭropanoj, kiuj fondis SAT. Iam eŭropanoj koloniis la aliajn kontinentojn por alporti al la tuta homaro la veran religion. Poste eŭropanoj koloniis la aliajn kontinentojn por alporti al la tuta homaro la lumon de la racio. Ke mi ne vidas la diferencon, jen kio pruvas, ke mi estas malprogresema fanatikulo : kompreneble raciismo, kiam ĝi perforte agas, estas pli akceptebla, tial ke ĝi estas raciista, ol kiu ajn alia perforto.

Sufiĉas legi la leterojn de Lanti por kompreni, ke lia sennaciismo ĉiam instigis lin aprobi ĉiajn imperiismojn. Notinde :

- li riproĉis al Stalino, ke li ne sufiĉe rusigis la sovetiajn popolojn

- li konsilis al francoj ke, se ilian landon okupos hitleranoj, ili akceptu fariĝi germanoj.

Tial mi neniel miras, ke oni trovas en SAT la rasteorion de la iluminita Ledon, la malamon de Aunis al la maldekstrularo kaj la koloniismon de Deker. Ili estas naturaj fruktoj de la lantia semo.

Ĝojinde, male de tio, kion kredas multaj esperantistoj en kaj ekster SAT, **SAT ne estas sennaciista asocio.** La celon malaperigi ĉiujn kulturojn minus unu havas, ne la tuta SAT kiel asocio, sed nur unu el ĝiaj frakcioj. SAT-anon nenio devigas aliĝi al la sennaciista frakcio. Fakte ekzistas diversaj sintenoj inter SAT-anoj pri la ideoj de Lanti :

- kelkaj SAT-anoj efektive komprenis la ideojn de Lanti, kaj ilin aprobas. Ili estas eta minoritato. Da lantianoj estas en SAT eĉ malpli, ol da kristanoj
- iom pli multaj SAT-anoj des pli pie kultas al Lanti, ke ili nenion komprenis pri liaj ideoj
- iuj SAT-anoj opinias, ke povas ekzisti aliaj formoj de sennaciismo, ol tiu de Lanti
- aliaj SAT-anoj simple neniel estas sennaciistoj, kaj provas defendi sian rajton ne kulti al la sankta fondinto.

Necesas do konscii, ke la **Manifesto de Sennaciistoj** ne estas la statuto de SAT.

Jakelino, SAT-ano 32199.

(*) Ivo estas la antaŭnomo, ne de Kreŝimir Barkoviĉ, sed de Yves Peyraut. Laŭ mia propra sperto, la manskribo de Yves Peyraut estas tiom mallegebla, ke neniam eblas scii, ĉu li skribis mi aŭ ni. Mi supozas, ke Ivo skribis : ni ne aperigos, kaj ne tiu ni signifas la Plenum-Komitaton de SAT. Se mi estas ĝuste informita, Barkoviĉ neniam sole decidas pri rifuzo de artikolo. Kiam tekston li opinias neaperigenda, li sciigas tion al PK, kiu kolektive decidas, ĉu la teksto aperu aŭ ne.

Suzanne :

PASKO. LA OFERO...

Murdita, ĉar ŝi brunigis siajn nudajn mamojn... *Pratempa dramo okazis en Andora (itala Lazura marbordo). Lundon, la 27an de marto 1989a, Maria Adua, kvindekjara, estis murdita fare de Giuliano Moschetto, liceano dekokjara,*

kiam ŝi bruniĝis sur la strando. Kriante, la liceano diris : "Vi ne plu senvestiĝu ĉe la plaĝo, hieraŭ vi donis obscenan spektaklon", antaŭ ol frakasi ŝian kranion per rulŝtono.

Kian klarigon tiri de tiu ĉi kruda faro ? Eble ĝi troviĝas ĉe la pastro de la urbo, Don Francesco Granero, kiu priskribis la murdinton (skolto kaj messervanto), kiel "modelan paroĥanon".

Kiu sentime ankoraŭ pretendus, ke la integrismo estas nura neatenditaĵo en la historio de la religioj ? Post la kampanjoj kontraŭ la filmo "La lasta tento de Kristo", aŭ la verko de Salman Rushdie "La satanaj paragrafetoj", jen paca banantino subfalis de la batoj de la Dio-frenezuloj.

Ĉu la laika mondo ankoraŭ longtempe suferos tiajn sovaĝecajn farojn sen energie protesti ?

Lucien Angevin :

Estas mirinde, ke ankoraŭ nuntempe kelkaj homoj parolas pri sovaĝulo, eĉ kiam temas pri popoloj, pri kiuj aliaj homoj (sciencistoj rigardantaj de alia vidpunkto) diras, ke ili havis grandan civilizacion.

Ĉar kio estas sovaĝuloj ? La Romianoj nomis barbaroj la aliajn popolojn. Sed la Romianoj estis kvazaŭ la unuaj koloniistoj kaj kapitalistoj. Ĉion bonan, kion ili faris en sia civilizacio, ili faris por si mem, por sia profito, trudeprenante de aliaj popoloj la teron, la naturajn produktojn kaj uzante por si mem la laborfortojn de la konkeritaj popoloj. Kaj se ŝajnas pli bonaj la vivkondiĉoj de tiuj ĉi, tio similas hundon, kiu fartas bone per la restaĵoj de sia bone manĝanta mastro, sed tamen ricevas la batojn.

Ĝenerale, la samaj homoj, kiuj nomas sovaĝuloj tiujn, kiuj ne havas eŭropan vivmanieron, tiuj ankaŭ ne kredas je ekologio. Tamen gravas kaj urĝas atenti pri la raporto de Tutmonda Komisiono pri Medio kaj Disvolviĝo, kreita de U.N.O. en 1983, kaj kies prezidantino estas la ĉefministrino de Norvegujo, S-ino Gro Harlem Bruntland.

Kia rilato inter sovaĝuloj kaj ekologianoj ?

Tiu ĉi, ke plej ofte la t.n. sovaĝuloj vivis tiamaniere, ke surtera vivo povis daŭri senfine, ĉar ili uzis kvazaŭ nur renovigeblajn energiojn kaj produktojn, zorgante ke la naturo sin konservu kaj reproduktu.

Tiaj estis ĉefe la indianoj de Nordameriko kaj pli-malpli

ĉiuj amerikaj indianoj, la kanakoj, la polinezianoj kaj verŝajne multaj aliaj.

Kion ni konas pri "sovaĝuloj" estas ĝenerale mensogoj de la "civilizaciuloj" (blankuloj), kiuj havis intereson mensogi por pravigi siajn agadojn : misiitoj kiuj trudis la kristana religion kaj kompreneble militistoj kaj ĉiuj kolonianoj, ĉu pri agrokulturo, komerco, minejo kaj ŝtatoficistoj.

Oni diris tiajn popolojn militemaj, dum plej ofte iliaj militoj similis al niaj bataloj en drinkejoj aŭ dancejoj, kun ne pli da mortoj kaj multe malpli ol en trafikakcidento.

Aliflanke, la pacemaj blankuloj multe pli mortigis en ĉiuj tempoj de la "civilizacio"

Ĉu inkvizicio, ĉu grandaj mondmilitoj - eĉ se oni apartigas naziismon, kvankam la nuntempaj novnazioj timigas, ke ĝi ne estas pasinta afero - ne faris pli grandajn buĉadojn?

Jes, nia mondo estas sur vojo al detruo. Tiuj, kiuj ne volas kredi tion, estas kiel pasaĝeroj en disrompiĝonta ŝipo, kiuj ne volas vidi sian proksiman dronadon. Kaj kiu poluas ĉion, aldonante CO^2, detruas ozonon, kaŭzas malaperon de vegetalaj kaj bestaj specioj ? kaj klimatŝanĝojn? Kiu malŝparegas mineralojn, produktojn forprenitajn el malriĉaj landoj ? Kiuj produktas jare 500 milionojn da tunoj da danĝeraj forĵetaĵoj grandparte senditaj al malriĉaj landoj ? Ja ne estas la t.n. sovaĝulo, sed kontraŭe la "civilizacio". La troproduktado de la "civiliza" agrokulturo 1-e devenas de la ekspluatado al malriĉaj landoj, 2-e produktas poluadon endanĝerigantan ĉian vivon, 3-e ne profitdonas al malriĉaj landoj, sed male detruas ilian kapablecon produkti.

Jen kion oni devas pripensi anstataŭ diri tiun insulton "sovaĝuloj", vorton ĉiam uzatan de ĉiuj imperiistoj ekspluatantaj homojn kaj detruantaj viveblecon sur la tero por sia senpera profito.

A. LOPEZ LUNA :

IOMETE PRI LA VORTO "MODERNA"

Legante la unuan paragrafon de artikolo aperinta en L! 79-a, paĝo 65a, mi troviĝis kun la esprimo "Esperanto Moderna" (kio estas ĉi tio, "Esperanto Moderna", mi min

demandas?). Tiu artikolo tute ne interesis min, ĉar mi amas "Esperanton Maljunan", la klasikan Esperanton, tiun de Zamenhof, tiun de Kabe, tiun de Lanti, tiun, kiun vi kaj mi uzas ĉu parole ĉu skribe. En ĉi tiu artikoleto mi pritraktos iomete tun vorton ofte, oftege uzata, nome "Moderna".

Iam, antaŭ relative multe da jaroj, ni diru antaŭ 50 jaroj, mi havis ĉi tie en urbo Buenos Aires, kie mi naskiĝis kaj loĝas, iun "Lernejon por Malllerni", aŭ, pli koncize, "Mallernejon". Sed kio estas mallerni ? Tion klarigos al vi la devizo de la "Mallernejo", kiu diris : "Ni purigas vian menson de la mensogoj encerbigitaj al vi kiel absolutaj veroj".

Nu, unu el la taskoj de la mallernantoj estis foliumi publicaĵojn de antaŭ cent jaroj, t.e. de 1848, ĉar la "Mallernejo" funkciadis plene ĉirkaŭ 1948-a. En tiuj publicaĵoj oni trovas ofte la esprimon "Ni, la modernuloj" (jaro 1848-a); "Ni, la modernaj homoj" (jaro 1868-a), k.s.

Ĉiu generacio konsideras sin "moderna" kaj je la pinto de la civilizo, eĉ ni mem, kiuj vivas en la jaro 1989-a post Kristo. Sed iam niaj "modernaĵoj" fariĝos "malmodernaĵoj" kaj multaj el niaj "veroj" fariĝos "malveroj", ĉar venos aliaj homoj, kiuj kreos mirindaĵojn kaj ni, la "modernuloj", ŝajnos pigmeoj kompare al ili. Ne forgesu, ke iam ni estos la "antikvuloj" kaj niaj posteuloj traktos nin same kiel ni traktas niajn antaŭulojn.

*Homo, kiu aspiras al la saĝeco, devas uzi kiel eble plej malmulte tiun trompeman vorton "**moderna**".*

Afablajn salutojn al ĉiuj gelaŭtuloj!

VALO :

Mi ricevis sinsekve du propagandajn cirkulerojn pri "Moderna Esperanto". La aŭtoroj pretendas, ke ili volas nenion ŝanĝi en la lingvo - krom la alfabeton.

Mi konfesas, ke iam mi mem interesiĝis pri la demando : forigo de la ĉapelliteroj. Mi eĉ (en Laŭte!) proponis solvon kiu estis ne pli nek malpli lama ol ĉiuj antaŭaj. Sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke temas pri falsa problemo : ĉar jam multaj presejoj posedas la fundamentan literaron, en kiu la supersignoj estas neniel ĝenoj por la tipografoj kaj por la legantoj.

Eĉ pli lama ol ĉiuj estas la "moderna" alfabeto. En ĝi "u" reprezentas laŭokaze la sonon de nia "u" aŭ de nia "ŭ"; "i" respondas ĉu al nia "i", ĉu al nia "j", kaj la sono de nia

(daŭrigo sur p.63)

laŭtaj informoj

Grzegorz WIEŃĆ, ul. Poprzeczna 14 c/13, PL-62-005 OWIŃSKA, Pollando, deziras korespondi kun gefrancoj kaj, tre dezirante viziti Francion, ŝatus tiucele ricevi invitilon. (Li jam havas pasporton). Ĉi-somere, li organizas en Pollando junularan naturistan tendaron. Jam estas partoprenontoj el Sovetio (16), Ĉeĥoslovakio (2) kaj Argentino (1)... Certe venos aliaj.

Nia kriminala felietono : Christophe Albouy estis liberigita la 16an de marto, ĉar la apelacia tribunalo juĝis, ke estis eraro en la proceduro de la proceso, per kiu li estis kondamnita. Christophe opinias, ke tiun decidon influis la solidaro, kiun li ricevis, interalie la fakto, ke Amnestio Internacia lin adoptis kiel malliberulon pro opinio. Tamen lia afero ne estas tute solvita, ĉar la armeo plu postulas de li, ke li soldatservu.

wwww

Financa bilanco pri la Esperanto-Budo en Parizo okaze de la Salono "Alimaniere Vivi"

Enspezoj		Elspezoj	
Donacoj	2855	Luado de budo	2800
Broŝuroj, libretoj venditaj Donacetoj	300	Vojaĝoj diversaj por prizorgi la aferon	1150
Rabatoj pri libroj	660	Sekretariaĵoj	1100
Kasedoj	160	Manĝoj (en Parizo)	620
	+ 3975		- 5670

Deficito : 1695 FF

Feliĉe la bilanco, kiun faris Emile MAS pri la kontaktoj, la vizitoj al sia budo, estas multe pli sukcesa. Pro tio mi daŭre estas preta plu ricevi mondonacojn por helpi al li kaj kuraĝigi lin. Al la poŝtkonto : Nicole DEJEAN Esperanto-budo, 2 270 13 V Toulouse.

Multan dankon al ĉiuj, kiuj jam mondonacis : HC : 50., P. kaj G.S. : 50., Eyzines-grupo : 300., Grupo de Ste Foy-la-Grande : 200., Grupo de Montauban : 205., F.E.T. : 300., Grupo de Bordeaux-Cenon : 600., kaj aliaj anonimaj donacintoj : 1150. Sume : 2855 FF.

N.D.

Laika Amikaro de Eyzines (F) - Esperanto-Fako

La 18an, 19an kaj 20an de marto, ni akceptis danan esp-istinon, S-inon NIELSEN el KOPENHAGO, kiu planis (kun helpo de JORGOS) dumonatan vojaĝon tra Francio.

Dimanĉon la 19an, en Kvartala Domo "La Arbaro", ŝi afable prezentis etan ekspozicion kaj lumbildojn pri Danlando.

Tiuokaze, la novbakitaj esp-istoj ĝojis konatiĝi kaj interparoli kun alilanda amikino. Partoprenis tiun kunvenon, krom geesp-istoj el diversaj lokoj, urbestro akompanata de Konsilanto pri Kulturo, prezidantino de Laika Amikaro, reprezentantoj de asocioj kaj "najbaroj" de la Kvartala Domo.

Fine, ni veturis ĝis strato Esperanto, por fotado, ĉar ĉiu deziris rememoraĵon pri tiu agrabla renkonto.

Lundon, okazis kunveneto por amikinoj, kiuj ne povis ĉeesti dimanĉe. Same kiel dimanĉe, estis agrable por la komencantinoj kompreni kaj paroli kun tiel afabla kaj klera esperantistino.

Laŭ informo de S-ro S. Mulas Gallego el GIJON Prezidanto de Astura Esperanto-Asocio

Post sciigo pri la naskiĝo de "Amikoj de Nordokcidenta Mediteraneo", li proponas krei saman por Portugalio, Norda Hispanio ĝis Sudokcidenta Francio. Per tiu asocio oni organizus kunvenojn kaj vojaĝojn.

S-ro Mulas Gallego petas, ke la E-gazetoj aperigu la artikolojn rilate al tiu nova asocio, por ke oni ne aldonu kotizon kaj abonon al ĉiuj jam ekzistantaj. Bonvolu seni vian opinion al :
"HELECO" (gazeto de Astura E-Asocio), Strato Begona nº25,
E-33205 GIJON (Asturias) Hispanio.

La temo de la ĉi-jara IJR. (daŭrigo de p.2) :

Eŭropo post 1992 : Ĉu nur por komercistoj ?

Entute, la koncepto de la komuna merkato ŝajnas tom neglekti la eŭropan civitanon kiel individuon. Precipe junuloj timas, ke tia Eŭropo ne konsideras iliajn interesojn, ke ĝi fariĝos eŭropo nur por komercistoj.

En Illertissen ni povas diskuti pri niaj esperoj, planoj kaj utopioj rilate la eŭropan kuniĝon. Ĉu kiel esperantistoj ni eble havas alternativan koncepton pri la komuneco kaj kunvivado de la popoloj ?

La renkontiĝo daŭrigas la tradicion de la someraj Internaciaj Junularaj Renkontiĝoj. Kiel antaŭe, ni intencas kunvivi dum unu semajno en internacia juneca etoso. Ni komune loĝos en amasloĝejo kaj mem preparos niajn manĝaĵojn (jam inkluzivitajn en la kotizo). Krom la tema programo ankaŭ estos ebleco por ripozo kaj distriĝo. Kompreneble, ni ankaŭ partoprenos en la SAT-kongreso, kiu samtempe okazos samloke. La partoprenantoj de la IJR estos aŭtomate aligitaj ankaŭ al la SAT-kongreso (sen pagi aldonan kotizon).

Se vi volas kontribui al la programo per prelego, laborgrupo aŭ distra ero, turniĝu al Simone Fischer, Steinmauerner Str. 22., D-7550 RASTATT tel.(+49-7222) 21515 aŭ al Saskia Veen, Prof. Nijpelstraat 19D, NL- 6224 BS MAASTRICHT, tel.(+31-43) 6231180.
Kotiztabelo :
ĝis 25 jaroj, antaŭ 30.06.89 : 120 DM, poste : 150 DM.
pli ol 25 jaroj : ĝis 30.06.89 : 160 DM, poste : 190 DM.
Aliĝadreso : Simone Fischer (vd. supre). Antaŭpagi al : Germana Esp-o-junularo, Rheinweg 15, D-5300 Bonn 1, kontonumero : 545 77-754 ĉe Poŝtĝiroficejo Karlsruhe (banka gvidnumero 660 100 75), kun la indiko "Illertissen".

Mi serĉas alilandulon por kunveturi per motorciklo (XT 600 kaj 200 MTX) tra Hispanio kaj Maroko. De la 3-a ĝis la 24-a de junio '89. Sin turni al : LANGLOIS Marc, 2 av. Georges Bizet, F-84000 AVIGNON. Tel.: 90-88-29-56.

ESPERANTO EN MINITEL

(Vd. L! 81, p.59). Amiko J. Grégoire rimarkis, ke la nova kodo estas : 3615 INDEP Rubriko H, anstataŭ G. Ĉu vere ?

El letero de nia ĉina amiko Shao Shukang :

"... Ĉu en "Laŭte" povus eniĝi la problemo "Kial sufiĉe naski ne volas vi blankuloj, la terglobaj riĉuloj kun belforma korpo kaj potenca nutra povo ?"

Sciiĝas de la tuta mondo, ke la populacia problemo estas severe minacanta kaj turmentanta plej multajn landojn de la "tria mondo". En mia lando, pri nasklimigo estas severa leĝo por urbanoj, kiu tamen apenaŭ superregas kamparanojn, al kiuj restas nur peceto de kultivebla tero. Plejparto de la teranoj devas fronti kaj penege solvi aliajn urĝajn problemojn ol tiujn ofte tuŝitajn en "laŭte", kiuj ŝajnas al mi ĉielaj, sed sendube tre interesaj kaj allogaj, ebla ankaŭ tuŝotaj de niaj ontaj generacioj."

****

"NUR PER AMO" : la nova (tria!) kasedo de NIKOLIN'

La magia gurdo de Nikolin' enkondukas per "French Cancan" ŝian novan kasedon dediĉitan al francaj kanzonoj tradukitaj de eminentaj kunlaborantoj Lagrange, Silfer, Piron, Martinelli, kiuj vete poluris belegajn tekstojn por plej famaj arioj, kiuj ŝajnos al vi tute rejunigitaj, eĉ eternigitaj! (Le doux caboulot, Moulin-Rouge, Bancs publics, Marjolaine, Froufrou, ktp, kaj kiel kronado "Le temps des cerises"). Nostalgio, poezio... Vian koron refoje trafos la voĉo de NIKOLIN', ŝia delikata sentemo, ankoraŭ pli evidenta en tiu ĉi kasedo, kies kanzon-sortimento ŝajnas mirinde harmonii kun ŝiaj propraj gustoj.

Post unua aŭdado, vi ne plu forgesos tiuj belaj interpretadoj. Nu, ni voĉdonu : ĉu tiu ĉi kasedo estas ŝia plej bona ? Mia respondo : ĉiuj estas ŝiaj plej bonaj!... **Kribo**

Mendu ĝin ĉe la Laŭtejo (70 FF, kiel la du ceteraj).



Amika E-Rondo Aĝenia :

* En Moulin de Beauville

Iom post iom konkretiĝas la plurfaceta projekto prezentita en L! 79 kaj celanta fari el la kampara bieno "Moulin de Beauville" E-renkontiĝejon, -eldonejon, -restadejon, ktp.

Dank'al la unuaj mondonacoj (vd. la liston poste kaj en L! 81, p.66) eblis aĉeti 3 lit-kanapojn + 2 unupersonajn litojn, kiuj aldoniĝas al jam ekzistanta dorm-materialo. Laŭ peto de donacintoj, parto de la cetera mono utilos por instali banĉambron.

La kunvensalono jam estas iom pli agrabla : ĝi ricevis belan kahelaron, kaj dank'al la helpo de amikoj restadintaj en la Muelejo komence de majo, komenciĝis la "vestado" de la muroj. Supre, sur etaĝo provizore utiligebla kiel dormejo, parto de la plafono estas renovigita por ŝirmi 2 ĉambretojn kaj la unuan banĉambron. La ceteran parton ni izolos subtegmente kun aldono de tegmenta fenestro. Ekstere, urtikoj kaj dornoj ricevas la taŭgan traktadon kaj la ĉie abundan lignon ni komencas kolekti, segi, amasigi por la malpli varmaj sezonoj.

Jen aliaj novaĵoj, kiuj iel kontribuos akceli la pretigadon kaj funkciadon de la tuta afero :

1) Ekde la mezo de junio eklogos surloke esperantista amiko.

2) La ĝisnuna prizorganto decidis liberiĝi tre baldaŭ el sia profesio por dediĉi sin al pli entuziasmodona afero, nome la per- kaj por-esperanta. Ŝviti, jes, sed ekskluzive "verde"!

3) Por ke **Amika E-Rondo Aĝenia** plilarĝigu sian bazon responde al siaj diversaj "servoj" kaj al la neceso doni al kiel eble plej multaj geamikoj - sen geografia limigo - la ebl-econ kundecidi kaj kunhelpi, estos aranĝita ĝenerala kunveno de AERA en junio por decidi modifojn de la asocia statuto kaj elekti novan responsularon. Ve, ĉi-lastan decidon necesigas ankaŭ la priplorinda fakto, ke forpasis nia amikino Ĝermena Roux, kiu prezidis AERA-n.

Post oficialigo de la statutaj modifoj ni vokos por amasa aniĝo de amikoj de L!, de la Broŝurservo, de "Moulin de Beauville" al AERA. La kotizo estos tre malalta. La personojn, kiuj jam monhelpis kaj la monprovizantoj (A kaj B) ni konsideros membroj por 1989, sen plia kotizo, se ili almenaŭ ne esprimas malkonsenton pri tiu "aŭtomata dungiĝo"...

La personoj interesiĝantaj pri la venonta restado en Beauville, notu la datojn : de la 10a de julio ĝis la 3a de aŭgusto kaj eventuale uzu la aliĝilon troviĝantan en L! 81, p.65.

Donacoj registritaj (dua listo) :
C.S. 1000 - G.C. 400 - P.F. 200 - H.D. 300 (Antaŭe : 9580, nun sume : 11480) (89.05.01). Unuaj akiritaĵoj : 3 litkanapoj : 2616 - 2 faldeblaj litoj : 570, sume : 3186.

****

Pri la nun okazanta maja renkontiĝo en Beauville aperos raporteto en la venonta n-ro, espereble **fine de junio.** Partoprenis geamikoj el Périgueux, Bondy, Cenon, Nantes, Aubagne, antaŭ la "printempa regiona kunveno" invitita por la 7a de majo en Beauville fare de ĝirondiaj geamikoj. La numeron, kiun vi nun legas, parte preparis la partoprenantoj de la renkontiĝo. Dankon al ili !

La apero de la venonta, ĝisdatigita, adresaro de L!, eble estos prokrastita, sed tamen okazos ĉi-jare post la necesa reordigado de la Laŭtejo.

Al ĉiuj geamikoj mi dankas pro ilia indulgemo kaj deziras pluan entreprenemon por la propraj kaj nia komuna aferoj

Kribo.

****

Sibilaj mesaĝoj : 1) la frontpaĝa simio ja rilatas al la afero
2. Se Josefo estus papilio, ĉiuj niaj problemoj ne estus solvitaj per tio.

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque. CPPAP nº 58651